

EL POPOLA ĈINIO

中國新道

3

1999

ISSN 0032-4361



Konsumantoj
defendas sin per leĝo
Inundo, bestoj kaj arkeo



Fuji-monto

de MORITA YOKO (Japanio)

*Niaj raportoj pri vivo de ordinaraj ĉinoj montras, ke en la evoluan-
ta Ĉinio oni vivas pli kaj pli bone. Ŝanĝiĝas ne nur la materia vivo, sed
ankaŭ la koncepto kaj spirito. "Konsumantoj defendas sin per leĝoj"
prezentas la staton de ĉinaj konsumantoj. La loĝantoj en evoluantaj
landoj jam kutimiĝis defendi siajn interesojn per leĝoj. Tamen por la
ĉinoj, kiuj spertas la transiron de planizita ekonomio al la merkata,
multaj leĝaj aferoj estas ne konataj. Ili devas lerni de komenco en tiu
flanko.*

*La inundego en 1998 influas diversajn flankojn de Ĉinio. "Inundo,
bestoj kaj arkeo" rakontas la travivaĵojn de bestoj en la katastrofo.
Ĉinoj diras: "Senkompata la katastrofo, tamen kompatemaj la ho-
moj." La kompatemo montriĝis ne nur en batalo kontraŭ la inundo kaj
helpo al la suferantoj, sed ankaŭ en protekto al la bestoj.*

*Tatuado estas primitiva kaj originala speco de la homa kulturo.
Preskaŭ ĉiuj nacioj havas tian kutimon. "Kulturo sur la haŭto" prezen-
tas iujn detalojn pri tatuado en Ĉinio.*

*Multaj legantoj ŝatas popolarakontojn kaj fablojn de Ĉinio. "Kam-
para knabino" estas interesa kore-nacia rakonto, kiu montras la saĝon
de laborulino.*

*Nia raportisto Wang Hanping vizitis Japanion en la pasinta okto-
bro, invitate de s-ino Morita Yoko. En unu monato li multe kontaktiĝis
kun japanaj samideanoj. Lia artikolo "En tagoj kun japanaj e-istoj" en
pluraj partoj ekaperis en la 2-a numero.*

La Red.

El Popola Ĉinio

3 [486] 1999



Lernado Foto de Han Hong

Ji-oj plejparte loĝis en la montregiono Liangshan de Sichuan-provinco, sudokcidenta Ĉinio. La tiea malvarma klimato malfavoras la terkulturadon. Pro tio ili vivis malriĉe. Por ŝanĝi tian situacion, la registaro mobilizis ilin transloĝiĝi al regiono abunda je pluvo, kun fekunda tero. Krome, ĝi ankaŭ lernigis al ili sciojn pri scienco kaj kulturo kaj asignis monon al ilia akvoutiliga kaj trafika konstruado. Post kelkaj jaroj pliboniĝis ilia vivo. La foto montras, ke ji-aj geknaboj lernas en lernejo nove konstruita.

EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fakoj de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu

Adreso: P.O. Kesto 77,

Beijing 100037, Ĉinio

Telefono kaj telefakso:

+86-10-6832 1808

Retpoŝto:

epc@china-report.com


Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn>

/ElPopolaCxinio>

ENHAŬO

- | | |
|--|--|
| <p>2 INTER NI</p> <p>4 EKONOMIE:
Por garantii gren-liveron;
Kurantaj aferoj; La oka
transloĝiĝo</p> <p>6 Konsumantoj defendas sin
per leĝoj</p> <p>8 Inundo, bestoj kaj arkeo</p> <p>10 EL ĈINAJ GAZETOJ</p> <p>12 ESP-NOVAĴOJ</p> <p>13 POR KOMENCANTOJ:
Lerni de bestoj</p> <p>13 KORESPONDI DEZIRAS</p> <p>14 Karmemore al Ye Junjian</p> <p>16 En tagoj kun japanaj
esperantistoj (II)</p> <p>20 Strangaĵoj en piedpilka ludo
de Ĉinio</p> <p>21 EN ĈINAJ URBETOJ:
Urbeto de <i>pulu</i> -oj</p> <p>24 TEMO PROPONITA DE
LEGANTOJ:
Ĉu ŝi rajtas ricevi la hereda-
ĵon?</p> | <p>25 NUNTEMPA BELARTO:
Poezio en akvarelo</p> <p>28 Vojaĝo en Benxi</p> <p>29 VESTOJ DE ĈINAJ NACIOJ:
"Heroa nodo" kaj brodita tuko</p> <p>32 La medi-protekta ekspedicio</p> <p>35 Landlima urbeto Dongxing</p> <p>37 Por ke ĉiuj havu brilajn okulojn</p> <p>38 ĈINA KULTURO
Kulturo sur la haŭto</p> <p>40 JUNULARO:
Melodioj transoceanaj</p> <p>42 Aŭreolo de "herezulo"</p> <p>44 Kampara knabino</p> <p>46 Espero de maljunulo Wang</p> <p>48 Poŝto en la antikva Ĉinio</p> <p>50 Koteksino — nova medika-
mento kontraŭ malario</p> <p>51 ĈINAJ POŝTMARKOJ:
Huangshan-monto</p> <p>2 FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:
Fuji-monto</p> <p>SUR LA DORSKOVRILO:
Pagodoj en Dali de Yunnan</p> |
|--|--|



Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- | | |
|------------------|----------------------|
| 1. Zigui (p. 5) | 4. Guilin (p. 12) |
| 2. Benxi (p. 28) | 5. Yongchang (p. 10) |
| 3. Xi'an (p. 10) | |

Por garantii gren-liveron

de JI PING

EN la pasintaj jaroj la ŝtataj gren-rezervaj departementoj de Ĉinio aĉetis grenojn de kamparanoj je prezo altiĝanta jaron post jaro, por ke ili volonte kulturu grenojn. Tamen la venda prezo de grenoj ne paralele altiĝis. Rezulte de tio, longatempe kaj serioze deficitis la menciitaj departementoj malgraŭ subvencio de la registaro.

Pasintomere dum gren-aĉetado la registaro aplikis serion da rimedoj por superregi la gren-produktejon kaj stabiligi la gren-merkaton. Tamen iuj kamparanoj ankoraŭ vendis grenojn al privataj komercistoj je prezo malpli alta ol tiu difinita de la ŝtato, poste la komercistoj revendis la prilaboritajn grenojn en la merkato je malpli alta prezo. Laŭ enketo, dekalkulante monsumon postulatan sub diversaj pretekstoj la kamparanoj fakte ricevis monon ne pli multe, ol se ili vendus grenojn al komercistoj donantaj al ili kontentigan servon; krome ankaŭ mankas al iuj ŝtataj departementoj gren-rezervejo kaj kapitalo. Jen kial la kamparanoj preferis vendi grenojn al komercistoj.

Tiuokaze la registaro okazigis kunvenon speciale por emfazi la reformajn principon kaj politikojn pri gren-cirkula sistemo, interalie plej grave estas, ke nur ŝtataj gren-rezervaj entreprenoj rajtas aĉeti grenojn de kamparanoj laŭ difinita prezo. Se ne, okazus io nebridebla. Ekz. en 1992, la registaroj de iuj lokoj lasis la grenan merkaton tro libere funkcii, rezulte de

tio komercistoj aĉetis grandan kvanton da grenoj en kamparo, la merkato falis en malordon kaj la prezo de grenoj altiĝis. Finfine la centra registaro ne povis vendi la speciale rezervitajn grenojn por reordigi la merkaton.

Por solvi la problemojn en gren-cirkulado, oni elpensis rimedon, ke la gren-rezervaj entreprenoj apartiĝu de la ŝtataj administraj institucioj kaj mem respondecu pri profito kaj defcito. La registaro devas liberigi la cirkuladon de grenoj, escepte de la aĉetado. Ekz., la ŝtataj gren-rezervaj entreprenoj difinu la vend-prezon de grenoj laŭ merkata leĝo; la privataj gren-prilaboraj entreprenoj estu permesataj prilabori grenojn, kun la premiso aĉeti prilaborotajn grenojn nepre ĉe ŝtataj gren-rezervaj entreprenoj, sed ne ĉe kamparanoj; gren-vendejoj estu liberaj en aĉetado de grenoj kaj difino de iliaj prezoj.

Nun urĝa laboro estas konstrui grenejojn. Laŭ informo, oni ekkonstruis duonon de la projektitaj grenejoj kun rezervokapablo de 25 miliardoj da kilogramoj. Tio garantios, ke la ŝtato aĉetos abundon da grenoj de kamparanoj. Tiam por la centra registaro necesas nur makroskope regi la grenojn kaj prizorgi administradon de specialaj grenoj; la lokaj registaroj respondecos pri lokaj produktado kaj cirkulado de grenoj. Kiam okazos lokaj naturaj katastrofoj, la lokaj registaroj helpos suferantojn per lokaj rezervitaj grenoj; nur kiam okazos grandega katastrofo, la grenoj rezervitaj de la ŝtato estos disponeblaj. ■

KURANTAJ AFEROJ

● Ĝis la fino de oktobro 1998, Ĉinio konstruis elektrizitajn fervojojn kun longeco de 12 575 km kaj per tio fariĝis la 9-a lando, kiu posedas elektrizitajn fervojojn de pli ol 10 mil km.

● En Ĉinio oni konstruis loĝdomojn kun plank-areo de 37.52 milionoj da kvadrataj metroj en 1978 kaj tiujn kun plank-areo de 300 milionoj da kvadrataj metroj en 1998.

● En Ĉinio finkonstruiĝis la unua simula laboratorio de nukleo-radiada medio. Ĝi estas uzata por sinteza esploro ne nur pri radiada medio, sed ankaŭ pri brula karbo kaj ceteraj industriaj poluciaĵoj.

● Finkonstruiĝis la Jinan-a Pontego super la Flava Rivero por la Pekin-Ŝanhaja Ekspresa Ŝoseo. Ĝi,

longa je 5 750 metroj, kun 210-metra spano kiel la ĉefa, la plej larĝa en Ĉinio, estas la plej granda kaj plej altnorme projektita ŝosea ponto super la Flava Rivero.

● Ĉinaj sciencistoj kolektis kaj transportis en Ĉinion la rubon forĵetitan en la pasintaj 10 jaroj en la stacio Sun Yatsen en Antarkto. Tion laŭdis la alilandaj sciencistoj, kiuj tie faris esploron.

Homfojoj de turistoj enirintaj en Ĉinion

1997	54 milionoj	en la 6-a loko en la mondo
1998 (jan.-aŭg.)	42.33 milionoj	en la 6-a loko en la mondo samperio



Maoping-urbeto

La oka transloĝiĝo

de JIN WEN

LAŭ diro, la gubernia urbo Zigui, Hubei-provinco, historie transloĝiĝis 7 fojojn pro inundo. Nun ĝi devas transloĝiĝi la 8-an fojon, ĉar ĝi sidas ĉe la ekstremo de la konstruo Tri Gorĝoj — la plej okulfrapa akvoutiliga konstruo de Ĉinio en tiu ĉi jarcento.

En Zigui kun 80 000 loĝantoj, ĉie estas homoj sin okupantaj pri transloĝiĝo. Iu junulo, kiu portis meblojn sur kamionon, montris sian hejmon kaj diris al mi: “En la estonteco la akvo estos pli alta ol la tegmento.”

Lernejoj estas unue translokitaj laŭ la plano de la Buroo de Setlado. La lerna medio en nova urbeto devas esti pretigita antaŭ la nova semestro. Sekve transloĝiĝas ankaŭ la familioj de la lernantoj.

Maoping-urbeto estas la nova sidejo de Zigui, kie finkonstruiĝis lernejoj, bankoj, magazenoj kaj hoteloj, kaj estas konstruataj loĝdomoj kaj ŝoseoj.

En nova loĝkvartalo iu oficisto de banko ĵus loĝiĝis en apartamento kun areo de 100 kvadrataj metroj. Por dekoracii la ĉambrojn kaj aĉeti pliajn meblojn, la mastro elspezis ĉ. 50 000 juanojn (1 USD = 8.3 juanoj). Simile estas por la najbaroj.

Li Guiqun, posedanto de ŝu-vendejo, diris, ke la nova urbeto situas ĉe la talio de la monto, kie estas malmultaj pasantoj, tial li sopiras la pasintecon, kiam lia vendejo estis prospera pro la movopleneco de la malnova urbo ĉe la rivero.

Tamen li diris fidoplene: “Tiam, kiam finiĝos la konstruo Tri Gorĝoj, prosperiĝos denove mia vendejo, ĉar ĉi tie estos kajo ĉe Yangzi-rivero, certe kun pasaĝeroj multegaj.” ■

Konsumantoj defendas sin per leĝoj

- Antaŭ kelkaj jaroj, kiam oni aĉetis malbonkvalitan varon, oni povis nur vespiri, atribuante tion al sia misfortuno.
- En Pekino du knabinoj estis suspektitaj pri ŝtelo en superbazaro kaj iliaj poŝoj priserĉitaj. Post tio ili procesis kontraŭ la superbazaraj gardistoj, kiuj faris la priserĉadon.
- En Ĉinio la konsumantoj nun lernas defendi sin per leĝoj. Tio tamen estas afero pagiga kaj temporaba.

de XIAO FEI

SE ne estus la Internacia Tago de la Konsumantoj, la 15-a de marto, dommastrino Fan Yumei ne turnus sin al la vendejo por ŝanĝi la difektitajn ŝuojn kontraŭ la novaj. Tiun paron da ŝuoj ŝi portis nur en mallonga tempo, tamen ili fendiĝis kaj ne taŭgis por daŭra portado. Antaŭe, tiaokaze oni povis nur vespiri, atribuante tion al sia misfortuno.

Sed ĉi-foje, kvankam ŝia fakturo perdiĝis, tamen post kiam la vendejo certigis pri la kvalito de

ŝiaj ŝuoj, ĝi senhezite donis al ŝi la novajn. En tio Fan Yumei vere ĝuis la rajton de la konsumantoj.

Samkiel s-ino Fan, multaj aliaj ĉinoj ekkonis la leĝon pri rajtoj de la konsumantoj pere de la Internacia Tago de Konsumantoj kaj iom post iom ellernis defendi sin per la leĝoj.

TAGO DE LA KONSUMANTOJ

La 15-an de marto ĉiujare, en grandaj urboj de Ĉinio oni faras propagandon pri rajtoj kaj intereso-
soj de la konsumantoj, donas konsultiĝon pri koncernaj leĝoj, sol-

vas problemojn de akuzantoj kaj konigas, kiel distingi bonkvalitajn varojn disde la malbonkvalitaj kaj kiel ekzameni la kvaliton de iuj varoj. Tiaokaze en la propagandoj ĉiam estas vigla spektaklo kaj svarmas konsultantoj. Oni diris, ke la 15-a de marto estas festotago de la konsumantoj.

Efektive, oni ŝatas ne nur tiun ĉi tagon. Oni deziras ricevi helpon ĉiam ajn en la malfaciloj. Tiaokaze oni ofte turnas sin al diversnivelaĵoj de konsumantoj de Ĉinio.

La Ĉina Federacio de Konsumantoj naskiĝis en Pekino fine de 1984. Post tio naskiĝis ĝiaj 3 000 filioj kun ĉ. 10 000 funkciuloj. La 15-an de marto estas bona ŝanco por ilia elmontriĝo. Krom propagando ili estas multe okupataj pri traktado de la akuzoj de konsumantoj. La federacio ofte interkonsiliĝas kun la entreprenoj por solvi la problemon. Koncerne gravajn aferojn kaj kvaliton de varoj, ĝi petas helpon de justicaj kaj ekspertizaj departementoj.

En tagoj post sia naskiĝo la federacio havis multajn malfacilojn en la laboro, ĉar tiam mankis koncernaj leĝoj. Nun Ĉinio havas ĉ. 200 leĝojn kaj kodojn, inter kiuj estas "Leĝo pri rajtoj de la konsumantoj", "Leĝo pri kvalito de la varoj", "Leĝo kontraŭ maljusta konkurenco" k.a. koncernantaj la



Propagando en la Internacia Tago de la Konsumantoj



"Lernu kiel koni falsajn kaj malbonkvalitajn varojn."

rajtojn de la konsumantoj. Kiam la rajtoj de la konsumantoj estas atentigitaj, ili povas fari proceson. La juĝejoj aktive traktas tiajn kazojn. Oni laŭ leĝoj kondamnas la malobservantojn de la leĝoj al mallibereco pro ties grava atenco al la rajtoj kaj interesoj de la konsumantoj. Tamen oni ofte sin turnas al la federacio, kiam ili havas malfacilon. Ĝenerale, la federacio servas kiel proparolanto kaj defendanto de la konsumantoj. Laŭ statistiko de 1984 la federacio traktis entute 3 milionojn da kazoj kaj sukcesis havigi al la konsumantoj kompensan monsumon de 1.26 miliardoj da juanoj.

KONSUMANTOJ MATURIĜANTAJ

Antaŭ kelkaj jaroj en Pekino du knabinoj estis suspektitaj pri ŝtelo en superbazaro kaj iliaj poŝoj perforte priserĉitaj. La knabinoj opiniis, ke tio makulis ilian honoron kaj sin turnis al proceso kaj gajnis ĝin. Similaj aferoj okazis ankaŭ en aliaj lokoj.

En Ĉinio la konsumantoj nun ne plu estas silentemaj aŭ tolereblaj al la malbona kvalito de varoj. En pekina ĵurnalo publikiĝis artikolo "Kiu respondecos pri la elektra

aparato Sony difektita tuj post la garantia periodo?" Post tio aperis multe da akuzoj kontraŭ la kompanio Sony. Pro tio la kompanio vole nevole promesis bone servi al la aĉetantoj post vendado.

Estas inde, ke oni faras proceson por 10 000 juanoj, sed s-ro Qiu Jiandong faris proceson por nur kelkdek fenoj (unu juano egalas cent fenojn).

S-ro Qiu faris longdistancan telefonadon post la 9-a horo vespere. Oni pagigis al li 1.8 juanojn, sed laŭ difino de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio, post la 9-a horo vespere la klientoj ĝuas 50% da rabato. Por tiu 0.9 juano Qiu faris akuzon. Li elspezis multe por la proceso. Li diris: "Mi batalas por justeco kaj ankaŭ por vekti la tutan socion en la batalo kontraŭ malhonesteco."

Por vekti la koncepton pri la leĝoj, ĉina junulo Wang Hai intence aĉetis falsajn varojn kaj post tio postulis altan kompenson laŭ la leĝo. Li fariĝis fama tra la lando. Iu sociologia komentariŝto diris: "Ŝajne ne devas aperi la fenomeno de Wang Hai. Tiun laboron devas fari entreprenoj kaj koncernaj departementoj de la registaro. Sed nun ĉie vidiĝas malbonkvalitaj aŭ falsaj varoj. La konsumantoj malkon-

tentas pri tio kaj certe faras batalon. Kun la socia progreso kaj leĝa perfektigo oni certe leviĝus kontraŭ ĉiaj trompoj al la konsumantoj, eĉ se ne estus Wang Hai."

AFERO DE LA TUTA SOCIO

Enketo pri la urbaj konsumantoj de Ĉinio en 1997 diras, ke la konsumantoj akuzas pri diversaj aferoj, inter kiuj pliigis akuzoj pri komputiloj, komercaj domoj kaj aŭtoj, sed tiuj pri mebloj, hejmaj elektraj aparatoj kaj manĝaĵoj konsistigis 52% de la totala nombro de la akuzoj. La enketo montras ankaŭ, ke en la jaro 1997 estis 15.25 milionoj da familioj, kies interesoj estis atentigitaj, kio koncernis 50 milionojn da konsumantoj. Nur 22.3% de ili postulis solvon, dum pli ol 70% restis silentaj, atribuant tion al sia misfortuno.

La federacio donas grandan atenton al la malfaciloj de la konsumantoj. Ĝiaj funkciuloj diris, ke nun por la proceso oni devas ne nur pagi multe, sed ankaŭ dediĉi multe da tempo kaj grandan energion. Fakte pro damaĝo de sia korpo oni ricevas kompenson nur pro kuracado kaj laborokosto. Kompreneble tio multe malpliigas ilian aktivecon por defendi siajn rajtojn kaj interesojn.

S-ro Cao Tiandian, prezidanto de la federacio, diris, ke la tuta socio devas doni grandan atenton al defendo de la leĝaj rajtoj kaj interesoj de la konsumantoj. Li montris, ke por plenumi tiun taskon energie laboras multaj organizaĵoj kaj la federacio estas nur unu el ili. En la pasintaj jaroj la ĉina ekonomio rapide disvolviĝis. Nun ekzistas diversspecaj fabrikoj kaj magazenoj kaj inter ili estas akra konkurenco. Ne estas strange, ke aperas falsaj kaj malbonkvalitaj varoj. Ili malaperos en la merkato nur tiam, kiam kompletiĝos la leĝoj kaj la konsumantoj scios bone defendi siajn rajtojn per la leĝoj. Tio dependas de la komuna penado de la ŝtato, entreprenoj kaj konsumantoj. ■



Livero de manĝaĵo al la elafuroj fuĝintaj

Inundo, bestoj kaj arkeo

de PANG BIAN

EN la somero de 1998 eksterordinara inundo atakis Ĉinio. Iuj bestoj, kiuj vivis en rezervejoj, perdis sian hejmon. Tiam oni konstruis por ili arkeon.

“ŜTATA TREZORO” NE PERDIĜU

Pli ol 40 elafuroj (*Elaphrus davidionus*) ne volis foriri de “cigna parko”, marĉo kun neelĉerpeblaj fragmitoj kaj akvaj plantoj. Tamen ĉirkaŭite de la inundo, ili ne povis ne fuĝi...

La korno de elafuro similas al tiu de cervo, la kapo al tiu de ĉevalo, la hufo al tiu de bovo kaj la vosto al tiu de azeno. Same kiel pando, la elafuro

vivas ĉefe en Ĉinio. En paleolitiko elafuro jam ekzistis en norda kaj centra Ĉinio. Poste pro evoluo de agrikulturo, la nombro de la elafuroj reduktiĝis. En 1900 pro milito centoj da elafuroj estis kunportitaj al Eŭropo, kaj el ili nur 18 restis vivaj. Iu brita duko ilin aĉetis je alta prezo kaj bredis en sia bieno. En la 80-aj jaroj la nombro kreskis ĝis centoj, inter kiuj pli ol 60 revenis al Ĉinio. Poste la nombro kreskis al ĉ. mil, kiuj vivas en 3 rezervejoj. Tiuj, kiuj vivas en “cigna parko”, estas plej similaj al la sovaĝaj.

Kiam la 1500-hektara “cigna parko” fariĝis izolita insulo pro la inundo, la laborantoj ekagis por protekti la elafurojn. Tage iuj riparigis la digon, aliaj falĉis herbojn en akvo por la elafuroj, kiuj ĉiutage manĝis 5 mil kg da herboj kaj pli ol 150 kg da maizo. Tial la unika ligna ŝipo de la insulo estis okupita tuttage.

Nokte la laborantoj gardantaj ĉe la rivero devis helpi la fuĝintajn elafurojn... En pli ol 50 noktoj, en la "cigna parko" brilis lampeto. La laborantoj diris, ke la elafuroj timas mallumon kaj la lampeto povas trankviligi ilin kaj kolekti ilin en furioza vento.

KUNE TRAVIVI MALFACILAN TEMPON

Juna ruĝverta gruo finfine revenis al Zhalong-rezervejo. Starante en malprofunda akvo kun verdaj fragmitoj, ĝi gaje frapadis la flugilojn. Tiam la eskortanto kun rido foriris...

Tiuvespere la gruo perdis ĝia patrino. Tiam iu bankisto, kiu gardis la digon, per siaj maldelikataj manoj milde prenis la gruojn. Kvankam li jam kelkajn tagojn ne satmanĝis, tamen li donis sian manĝaĵon al la gruo kaj dormigis ĝin. Je la 4-a matene la gruo subite vekigis pro torenta ondego. La digo breĉiĝis, la gruo konsterniĝis kaj baraktis por forflugi, tamen ne sukcesis, tial ĝi bekis senĉese... Ĉe tagiĝo la gruo rimarkis, ke ĝi estas alte tenata de la bankisto, kiu malfacile marŝis en la akvo profunda ĝis la talio. Lia frunto estis serioze vundita de la bekado...

Tio okazis en Durbote, Heilongjiang-provinco. Poste la eskortanto diris, ke ruĝvertaj gruoj estas protektataj pereontaj birdoj. Nun en la mondo restas nur iom pli ol 1100 ruĝvertaj gruoj, inter kiuj 340 vivas en Zhalong-rezervejo. En printempo ili transflugas norden al la hejmloko por naski idojn. Tamen en 1998 ili renkontis inundon... Laborantoj de la rezervejo diris: "Se akvo leviĝis ĝis iliaj genuoj, estas malfacile por ili serĉi manĝaĵon, kaj plie, ili ne havas forton por forflugi el la inundo." Tiam oni devas helpi ilin, kiel Noa per arkeo forportis la familianojn kaj bestojn.

Dum la inundo de 1998 multaj Zhalong-anoj kune kun gruoj travivis malfacilan kaj danĝeran tempon. Por savi tiujn birdojn el la inundo, loka ĵurnalo publikigis la anoncon: Ruĝverta gruo ŝatas manĝi freŝajn fiŝetojn kaj salikokojn, kaj ankaŭ grenojn, trinki akvon el puto, tamen ne tre malvarman; kuracu malsanajn gruojn, donu al ili medikamenton. Se oni renkontas malsanajn gruojn, bonvolu tuj informi la rezervejon, ĉar sovaĝaj gruoj ne devas esti hejme bredataj pli ol 15 tagojn.

"HONORAJ GASTOJ" EN KAĜOJ

En aŭgusto en Harbin daŭre pluvegis. Tio ĝojiĝis 52 tigrojn en la tigra ĝardeno, precipe la "reĝon". Ĝi subakviĝis kaj naĝis en diversaj pozoj. Tamen post nelonge la digo de Songhua-rivero breĉiĝis. Oni ordonis kolekti la tigrojn en la zoon. Kia malfacilo! Tiuj tigroj estis sufiĉe sovaĝaj. Kvankam la laborantoj jam faris ĉion eblan, tamen ankoraŭ 3 tigroj kuŝis sur vojo vizaĝe al ĉirkaŭantaj aŭtoj. Finfine oni per viva besto allogis ilin en ferajn kaĝojn. Apenaŭ 12 viroj per fera stango levis 250-kilograman tigron kaj sampezan kaĝon, la stango kurbiĝis. La "reĝo" estis tiel forta, ke oni devis uzi ŝovelmaŝinon por transporti ĝin. Neatendite ĝi muĝis, sekvis la aliaj. Kaj

oni tremis de timo.

Ili ne ŝatis la kaĝojn, ĉar en la tigra ĝardeno ili dormis eksterdome. Ili rifuzis manĝi kaj protestis per frapiĝo kontraŭ la kaĝoj. Post 7-15 tagoj ili kvietiĝis. Tie ili manĝis bone. Ĉiutage ĉiu tigro havis lakton, supon de ovo kaj 20 kg da bovaĵo. Ili estis "honoraj gastoj" en kaĝoj.

Tamen la tigrino maldikiĝis. Antaŭe ĝi estis gracia, fieraj kaj ĉarma. Nun bredistoj atente bredis ĝin, alie ĝi perdos la nomon "senegala belulino", ĉar ĝia bela filino jam estis en pubereco.


La impona "reĝo" multe silentis. Iam de la 4-a matene ĝis la 24-a ĝi luktis sinsekve kun 4 tigroj kaj gajnis la tronon. De tiam sen ĝia ordono, la aliaj tigroj ne kuraĝis preni manĝaĵon.

1-2-jaraj tigroj ankoraŭ estis viglaj. Ili nek timis nek vundis homojn. Se ili vidis homojn, ili apogis la antaŭajn piedojn sur la balustrado por rigardi.

En izolejo estis 4 frunaskitaj tigroj. Ilia patrino ne produktis lakton pro timo sur vojo. Tial la laborantoj venigis hundinon kiel ilian nutristinon. Neatendite ili kune vivis bone.

Antaŭ la vintro revenis rifuĝintaj nordorientaj tigroj. Fakte arbaroj estas ilia hejmo. Ĉu inundo okazus, se ekzistus sufiĉe da arboj? Ĉu la hejmo de homoj perdiĝus? Ĉu oni bezonus la ferajn kaĝojn por la tigroj? Post la inundo la ĉina registaro publikigis dekreton "malpermesi haki arbojn" por protekti la komunan hejmon de la homaro kaj bestoj. ■

Nekrologo



Hispana samideano Jose Ivern Mas (1932-1998), fidedela leganto de "El Popola Ĉinio", forpasis la 13-an de oktobro 1998 pro kormal-sano.

Li estis esperantisto ekde 1952 kaj dum sia tuta vivo estis ligita kun la esperantista familio. Dum multaj jaroj li estis membro kaj kasisto de la Hispana Esperanto-Instituto kaj membro de la Hispana Esperanto-Federacio, Kultura Asocio Esperantista, Kataluna Esperanto-Asocio kaj Universala Esperanto-Asocio. Li helpis establi la Muzeon de Esperanto de Sant Pau d'Ordal. Li estis unu el la ĉefaj iniciatintoj de la organizado de la Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo. Li organizis karavanon de hispanaj samideanoj al la 5-a Pacifika Kongreso de Esperanto okazinta en 1992 en Qingdao, Ĉinio, kaj starigis amikajn rilatojn kun ĉinaj samideanoj. Liaj kontribuoj al la Esperanto-movado estas laŭdindaj.

LA ĈINA SIMFONIA ORKESTRO EN REFORMADO

Komence de 1996, la Centra Simfonia Orkestro, fondita en 1956, ŝanĝis sian nomon en la Ĉinan Simfonian Orkestron. Post tio sekvis ĝin serio da reformoj. Tie ĉiuj dungitoj devas trapasi ekzamenon kaj la dungiteco ĝenerale daŭras nur 1-3 jarojn. Sed antaŭe, ĉiuj ĝiaj membroj, ĉu altnivelaj ĉu ordinaraj, ĉiuj povis labori en ĝi la tutan vivon.

61-jara Xin Dihe estas la plej aĝa de la orkestro. Antaŭe li servis

distingo de aĝo. Kompare kun la antaŭa egalisma sistemo de distribuo, la diferenco de la estantaj salajroj estas granda kaj la enspezo de la muzikistoj rimarkinde altiĝis.

S-ro Chen Zuohuang, talenta, devokonscia kaj praktikema ĝenerala inspektoro de la orkestro, penas fari la orkestron fierinda por la aŭskultantoj kaj aliaj subtenantoj.

PRI POSTEULOJ DE ROMIANOJ

Yongchang-gubernio, Gansu-provinco, Ĉinio, estis strategie grava loko ĉe la antikva Silka Vojo.

Ili enterigas la mortintojn senescepte kun ties kapo okcidenten. Kiel hispanoj, multaj vilaĝanoj ŝatas toreadon kaj aparte respektas la bovon. Ili prenas farunan manĝaĵon en formo de bovo kiel oferaĵon en ĉiu Novjara Tago. Eŭropaj fakuloj opinias, ke ili estas posteuloj de romiaj armeanoj perdiĝintaj antaŭ 2 000 jaroj.

Post koncerna esploro oni konstatis, ke en 53 a. K. 50 mil militistoj de Romio atakis la Centran Azion. Fine ili fiaskis kaj 6 mil el ili trarompis la sieĝon, tamen, pri ili ne troveblas la paĝo en la romia historio.

Estas nekontestebla la fakto, ke la vilaĝanoj estas posteuloj de romiaj armeanoj, tamen ĝis nun ne ĉiuj enigmoj pri ili estas solvitaj. Ekzemple, krom la tieaj vilaĝanoj, iliaj posteuloj eble troviĝas ankaŭ en aliaj lokoj. Laboranto de la Ĉina Buroo de Historiaj Objektoj diris, ke li kaj liaj kolegoj trovis en templo de Xinjiang romia-stilan freskon kun surskribo en nacimalplimulta lingvo, ke metiisto Diŝa faris ĝin kaj ricevis 3 mil helenajn monerojn kiel laborpagon. Diŝa estas tipa nomo de romianoj. Ĉu ankaŭ en Xinjiang loĝas posteuloj de romiaj militistoj? Ĉu iliaj edzinoj estas hanoj aŭ nacimalplimultanoj de Ĉinio? Por ĉio ĉi necesas plua esploro.

KIOM ALTAS LA ĈIELO? KIOM DIKAS LA TERKRUSTO?

En la lastaj jaroj ĉinaj sciencistoj akiris kompare precizajn datenojn pri alto de la ĉielo kaj diko de la terkrusto.

Tri sciencistoj faris altitudan esploron en speciala balono. Kiam la balono leviĝis ĝis la alteco de 8.6 km, ili trovis, ke sube la ĉielo estas blua. Kiam la balono leviĝis ĝis la alteco de 10.8 km, tie la ĉielo estas malhelblua. En la alteco de 13 km, la ĉielo estas malhele purpura. En la alteco de ĉ. 18 km la ĉielo



Prezentado de la Ĉina Simfonia Orkestro

kiel la unua hoboĵisto de la Centra Simfonia Orkestro. Samkiel aliaj, li reprenis la nunan oficon post ekzameno. Li diris: "Komence mi sentis honton, ke mi estis ekzamenata kune kun miaj lernantoj kaj eĉ iliaj lernantoj. Kaj poste, mi konsciis, ke ekzameno faras plej grandan justecon al ĉiuj senescepte."

La membroj de la Ĉina Simfonia Orkestro havas averaĝan aĝon de 34.6 jaroj. Ili ĉiuj ricevas monatan salajron laŭ sia ofico sen

Esplorante la gubernion, la Monda Ekspedicio pri Silka Vojo, organizita de Unesko, rimarkis, ke la antikva urbo Luanniao, ĉ. 100 km sudokcidente de la gubernia urbo, distingiĝas per tipa romia stilo de arkitekturo.

Aparte mirindas, ke la plenkreskuloj de la tiea vilaĝo Zhelaizhai estas altastaturaj kaj fortikaj, kun tre elstara nazalo, enkaviĝintaj orbitoj kaj bukraj blondaj haroj. En la vilaĝo furoras moroj malsamaj ol tiuj en aliaj lokoj.

estas malluma pro nereflektebleco de sunlumo en ekstreme maldensa aero. Tial, oni povas diri, ke la blua ĉielo altas nur dek km super la tero.

La artefarita satelito determinis, ke la monto Ĉimborazo, 6 310 m super la marnivelo, en Ekvadoro estas la plej dika terkrusto en la mondo. Proksime al la ekvatoro, ĝi distancas de la tera kereno du km pli longa ol Qomolangma. Sciencistoj trovis, ke funde de Atlantiko ekster la marbordo de la Suda Ameriko etendiĝas fendado de sude norden, kie la terkrusto dikas nur 1.6 km. Kalkulate de fakuloj, la averaĝa diko de la terkrusto estas ĉ. 17 km. Se oni fosus tunelon inter la suda kaj norda polusoj, la tunelo longus 12 700 km.

RELIKVOJ DE ŜAKJAMUNIO MALKOVBITAJ


Historia libro diras, ke post kiam Ŝakjamunio nirvaniĝis, lia kadavro fariĝis 86 400 relikvoj perloformaj. Ilin kultas liaj adeptoj en diversaj landoj. En la jaro 601, en 31 prefektoj de Ĉinio estis konstruitaj pagodoj por konservi liajn relikvojn. Post longa tempo multaj el la pagodoj malaperis kune kun la relikvoj.

La lastan aŭtunon, por fari

akvoutiligan konstruon en la gubernio Zhouzhi, Xi'an, Ĉinio, oni komencis transloki la tiean templon Xianyou. Dum la translokado estis malkovrita subtera palaceto sub la pagodo en la templo.

La palaceto estas kvadrato kun 1.2-metra latero. Ĝi lokiĝas tri metrojn sub la bazo de la pagodo. Meze de la palaceto estas ŝtona kesto alta 40 cm kaj longa 60 cm. Sur la kesto metiĝas griza fajenca incensujo. Kiam arkeologoj deprenis la kovrilon de la incensujo, ili trovis cindron en ĝi. Flanke de la kesto staras kvadrata steleo kun 80-centimetra latero. Sur ĝia fronto legiĝas, ke oni respektoplene konstruis la pagodon en la templo por enteni la relikvojn de la Budho kun la celo, ke li benu ĉiujn en la mondo.

Malferminte la keston, arkeologoj vidis, ke en ĝi kuŝas orita kupra ĉerketo firme pakita per nigra silkaĵo kaj ĉirkaŭvolvita per tri silkaj fadenoj, koroditaj tamen nerompitaj. Tio montras, ke ĝi estis neniam malfermita. Farinte teknikan traktadon, ili malfermis la ĉerkon kaj trovis en ĝi la buntan entenaton kun silkomaso ene. En la silkomaso estas glazura vazo delikata kaj helverda, kun dek kristalaj kaj malmolaj relikvoj sur la parieto.



La orita kupra ĉerketo malkovrita

La 1-a Internacia Konferenco pri Agrikulturo kaj Medio okazos en Xi'an

Je la 7-a kaj 8-a de novembro 1998, dum la 5-a Ĉina Agrikultura Scienca kaj Teknika Foiro, estraranoj de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio kaj esperantistoj de Shaanxi- kaj Gansu-provincoj kunsidis en la Insekta Muzeo de la Nordokcidenta Agrikultura Universitato, lulilo de la ĉina agrikultura Esperanto-movado. Fama ĉina entomologo prof. lo Chou, prof. Li Kexi kaj aliaj pli ol 20 esperantistoj interŝanĝis spertojn kaj vizitis la Insektan Muzeon, kies nomo sur la ŝildo estas en Esperanto kaj kiun stariĝis prof. lo Chou. Laŭ la decido de la kunsido la Xi'an-a Esperanto-Asocio gastigos la 1-an Internacian Konferencon pri Agrikulturo kaj Medio en Xi'an, ĉefurbo de Shaanxi-provinco, en novembro 1999, samtempe okazos ankaŭ la 6-a Ĉina Agrikultura Scienca kaj Teknika Foiro, kiun gastigos la registaro. La kontakta adreso: Wang Tianyi, Xi'an-a Esperanto-Asocio, Xiyang lu 74, CN-710054 Xi'an, Ĉinio. La retadreso: esperanto@pub.cn. Disertaĵojn pri agrikulturo aŭ medio por la konferenco sendu al la ĝenerala sekretario de la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio: Huang Yinbao, Jingchuan-Xian Kewei, Jingchuan, CN-744300 Gansu, Ĉinio. La retadreso: agrikulturo@esperanto.nu.

ĈINIO

● Vespere de la 14-a de novembro 1998, en la elsendejo de la Guilin-a Popola Radio de Guangxi la Esperanta poeto sinjoro Lu Jixin akceptis intervjuon de fraŭlino Wen Xin, anoncistino de la programo "Vojaĝo tra la vivo". En la ĉirkaŭ kvardek-minuta programo estis dissendataj ankaŭ du Esperantaj kantoj kaj du Esperantaj poemoj verkitaj de Lu. Post la programo Wen Xin kaj Lu ricevis leterojn de aŭskultantoj, kiuj deziras lerni Esperanton

(Wen Xin)

● Inter la 14-a kaj la 16-a de novembro dudek esperantistoj ĉeestis Esperantan seminarion okazintan en Zherong, Fujian-provinco. En la seminario la Zherong-a E-Asocio fondiĝis. Guo Shaomei kaj Jiang Mushu estis elektitaj kiel prezidanto kaj ĝenerala sekretario respektive.

(Velado)

ca. Ĉeestis ĉ. 300 reprezentantoj de la tuta lando kaj kelkaj alilandaj gastoj. La evento koincidis kun la 90-jariĝo de la loka E-movado kaj tio pliriĉigis la tritagan programon. Sub la aŭspicioj de la urbestro mem, la kongresanoj ĝuis komfortajn ejojn, senpagan veturadon kaj ekskursadon per la urbaj aŭtobusoj. La kongreso debatis la staton de la landa movado kaj aliajn problemojn. Estis unuanime akceptita nova asocia statuto.

(Hristo Manolov)

ĈEĤIO

● La 22-an de majo 1999 Esperanto Klubo Prostejov aranĝos renkontiĝon okaze de la 90-a datreveno de sia fondiĝo kun letervespero, en kiu estos tralegitaj ĉiuj ricevitaj leteroj. Ili petas ĉiujn el la tuta mondo sendi ĝis la 15-a de aprilo 1999 leterojn al la letervespero. La respondo estas

HISPANIO

● La 30-an de septembro 1998 Barcelona Esperanto-Centro organizis kulturalan kunvenon dank' al geedzoj Manuel de Seabra kaj Vimala Devi. Manuel de Seabra informis pri siaj demarŝoj por kandidatiĝi s-ron William Auld por la Nobelpremio por Literaturo (jaro 1999) en la UK en Montpellier, Francio, kaj ankaŭ pri la kontaktoj kaj korespondado, kiujn li realigis dum pli malpli unu jaro antaŭ la UK.

(Salvador Aragaj)

SERBIO

● En la urbo Banja Luko, Respubliko Srpska (Bosnio kaj Hercegovino), okazis en septembro, unusemajna, La Tria Librofoiro — Banja Luko '98. La librofoiron partoprenis ankaŭ esperantistoj de Esperanto Ligo de Respubliko Srpska. La librofoiron vizitis multaj homoj el la tuta respubliko kaj Jugoslavio. La stando estis space modesta sed tre sukcesa samkiel dum la antaŭaj jaroj. Plejparto de vizitantoj interesiĝis pri la stando komence de infanoj kaj lernantoj ĝis la universitataj profesoroj kaj bibliotekistoj.

(Mico Vrhovac)



En la fondkunveno de la Zherong-a E-Asocio

BULGARIO

● La 49-a Kongreso de Bulgara E-Asocio okazis en septembro 1998 en la urbo Gorna Orjahovi-

garantiata kaj ĉiuj leteroj estos ekspoziciitaj en majo 1999 dum la Esperanto-ekspozicio en urba muzeo. Bonvolu skribi je la adreso de Esperanto Klubo Prostejov, Husovo nam. 85,796 01 Prostejov, Ĉeĥio.


(Liska Jaroslav)



La stando de Esperanto Ligo de Respubliko Srpska

Lerni de bestoj

de LAO BI



IU fama bestkuracisto konsilas, ke homoj devas lerni de bestoj. “Ne nur kato kaj hundo en hejmo, sed ankaŭ leono sur afrika stepo havas saman karakteron — krom sufiĉe dormi kaj manĝi en malsato ili deziras nenion alian kaj neniam bedaŭras la hieraŭon nek zorgas pri la morgaŭo. Se la homa vivo similus al tio, oni certe sanus kaj vivus pli longe.”

La hundo edifas al ni, ke oni devas forlasi malagrablaĵon kaj rigardi la belan flankon de la vivo.

“Post turmentado la hundo rapide forgesas la suferon kaj ĝuas sian vivon — serĉas ĉiun oston troveblan aŭ gaje kuradas en ĝardeno.”

La kato ĉiam estas kontenta pri sia vivo kaj neniam maltrankviliĝas pri la morgaŭo.

“La kato neniam ĉagreniĝas. Eĉ ĉe eta streĉiĝo ĝi forpelas maltrankvilon per dormo.”

La birdo instruas nin, ke oni devas scii ripozi en okupiteco kaj ĝui sian vivon.

“Eĉ la plej okupitaj birdoj ofte kantas sur branĉoj. Kompreneble, tio eble estas interŝanĝo de amkantoj de virbirdoj kaj birdinoj. Tamen mi kredas, ke ili kantas ĉefe por sia vivĝojo.”

La bestkuracisto diris, ke la bestoj ne scias ĉagrenon, detenas sin de ekscesa manĝado, ekdormas ĉe dormemo kaj faras korpo-movadon ĉiutage. La vivmaniero de bestoj estas pli bona ol tiu de la homoj. Tial la homoj devas lerni de bestoj. ■

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: Du internaciaj respondokuponoj por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Esp-organizoj kaj niaj perantoj ĝuas 50% da rabato. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Sun Sun, 28-j. direktoro de farmacia kompanio, volas kor. Esperante, angle kaj ĉine kun lernantoj kaj esperantistoj de la sama profesio el la mondo pri ĉina

medikamento, filatelo, ĉina ŝako kaj turismo. Adr.: 32-1107, Jiangwan Lu, Guangzhou 510110, Guangdong, Ĉinio.

* Zhou Yinlin, 17-j. lernantino, volas kor. Esperante, angle kaj japane kun lernantoj el la mondo pri lernado, matematiko, kemio, pentrado, kanto, filatelo, violonludo, legado kaj turismo. Adr.: 1-401, Xi-9 Jie, Jianshe Da Ma Lu, Guangzhou 510060, Guangdong, Ĉinio.

* S-ino Gwenda Suttin dez. kor., interesiĝas pri skoltismo. Adr.: 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 6001, Novze-lando.

* S-ro Amjad Butt dez. kor. tm. Adr.: Esperanto Domo, Short Cut Road, Murree 47150, Pakistano.

* S-ro Julio Zevallos Gomez dez. kor., interesiĝas pri eksporto kaj imorto. Adr.: Manuel Candamo 549, Lima, Peruo.

Nekrologo



S-ro Ye Junjian (1914-1999), pseŭdonime Cicio Mar, fama ĉina verkisto, tradukisto, honora prezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, vicprezidanto de la ĉina societo “Amikoj de Esperanto”, konsiliano de la redakcio de “El Popola Ĉinio” kaj vicprezidanto de la Ĉina Tradukista Asocio, forpasis en Pekino la 5-an de januaro 1999 pro kancero.

Ye Junjian esperantistiĝis en 1931. Lia unua literatura verko, novelo “Je la Jarfino”, estis originale verkita en Esperanto. Lia romano “Montara Vilaĝo” en Esperanta versio estis enlistigita kiel n-ro 21 de la Serio Oriento-Okcidento sub la aŭspicioj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA). Li ĉinigis verkojn de pli ol dek landoj, i.a. “Plena Kolekto de la Fabeloj de Andersen” estas unu el la plej influhavaj tradukaĵoj en Ĉinio. Li multfoje partoprenis Universalajn Kongresojn de Esperanto kaj funkciis kiel komitatano de UEA kaj vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo.

Lia forpaso estas granda perdo ne nur por la ĉina literatura rondo, sed ankaŭ por la ĉina Esperanto-movado.

Funebran saluton al li.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de “El Popola Ĉinio”

KARMEMORE AL YE JUNJIAN

de ZHANG QICHENG

ĈE la komenco de la jaro 1999, multaj ĵurnaloj en Pekino informis: “Verkisto kaj tradukisto Ye Junjian forpasis la 5-an de januaro 1999.” Mi konis lin jam en la 30-aj jaroj. Tiam li ankoraŭ ne estis fama verkisto, sed juna studento kun la nomo Cicio Mar, kiu verkis en Esperanto. Kun Ĵelezo mi redaktis tiam Esperantan gazeton “La Mondo”. Foje ni ricevis kontribuojn — Esperantan novelaron “Forgesitaj Homoj”, kies enhavo estas interesa. Ni tre ĝojis, ke en Ĉinio aperis juna Esperanto-verkisto. La novbakita verkisto Cicio Mar rapide progresis. Poste li lernis la danan lingvon en Danio kaj ĉinigis “Verkaron de Andersen” (16 volumoj), pro kio

li famiĝis kiel tradukisto kaj poste ricevis “Naci-flagan Ordenon” de la dana registaro.

La ĵurnaloj diras, ke li verkis en la lingvoj ĉina, angla kaj Esperanto. Fakte, li verkis en Esperanto multe pli frue ol en la angla. Lia unua novelo “Je la Jarfino” estis verkita en Esperanto. Fine de la 30-aj jaroj li multe verkis por la naci-sava batalo de la ĉina popolo kontraŭ la japanaj invadantoj. Mi estis raportisto de iu ĵurnalo kaj ofte renkontis lin en kulturaj aktivadoj.

Tiam li laboris ĉefe kiel anglalingva tradukisto, tamen ne forlasis Esperanton. En 1938 li esperantigis novelaron pri la Kontraŭ-japana Rezistmilito, kiun eldonis “Orienta Kuriero”. En la 40-aj jaroj li studis en la Kembriĝa Universitato. Kaj mi laboris kiel ĵurnalistino en Singapuro, poste pro

japana invado mi fuĝis al Indonezio. Pro apartigo de oceanoj ni ricevis neniun informon unu de la alia. Ni renkontiĝis poste en Pekino post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Li eklaboris en Pekino pri kulturaj rilatoj kun eksterlando. Kiel literaturisto, li sentis bezonon fondi literaturan gazeton por konigi la pasintan kaj nuntempan Ĉinion al la alilandaj legantoj. Li do fondis la periodaĵon “Ĉina Literaturo”, kiu eldoniĝis unue anglalingve kaj poste ankaŭ franclingve. Li plenergie laboris pri ĝiaj redaktado kaj tradukado. Lia laboro donis frukton — la gazeto kun riĉa enhavo kaj bela lingvaĵo estis tuj akceptita de la legantoj. Nun “Ĉina Literaturo” daŭre eldoniĝas.

En la universitato li lernis la anglan lingvon, kaj lia studo poste

en Londono perfektigis al li la lingvon. Li komencis verki romanojn pri Ĉinio en la angla lingvo. Lia romano "Montara Vilaĝo" originale verkita en la angla estis tradukita en multajn eŭropajn lingvojn. Sed mankis la Esperanta versio. Do mi petis s-ron William Auld, ke li esperantigu ĝin. Ĉar Auld estas brito kaj bone scias Esperanton, li estas la plej kompetenta por tiu tasko. Li ĝoje akceptis tion. Poste li diris al mi, ke li tradukis la libron kun granda plezuro, ĉar la angla lingvo de Ye estas tre flua. Kiel grava verko, "Montara Vilaĝo" en Esperanta versio estis enlistigita en la Serion Oriento-Okcidento sub la aŭspicioj de la Universala Esperanto-Asocio.

Kvankam Ye famiĝis en la mondo pro sia anglalingva verkado, tamen li havis grandan entuziasmon por Esperanto. Li partoprenis la 34-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en 1949 en Britio post la Dua Mondmilito.

Ĝuste en tiu kongreso li konatiĝis kun Wanda, bofilino de L.L. Zamenhof. En 1987, dum la 72-a UK en Varsovio li renkontis ŝian filon, Ludwik Zaleski Zamenhof, nepon de L.L. Zamenhof. Li tre ĝojis kaj verkis la artikolon "Nova amikeco kun familianoj de Zamenhof".

Li multfoje partoprenis UK kaj laŭ mia propono dufoje prelegis en la Internacia Kongresa Universitato. Foje mi proponis la titolon "Andersen en Ĉinio". Ĉar li ĉinigiĝis la fabelojn de Andersen, li tre bone konis la aŭtoron kaj la ŝaton de ĉinoj al Andersen. Kompreneble, lia prelego estis tre alloga.

Kiel literaturisto, Ye verkis ne nur romanojn kaj novelojn, sed ankaŭ eseojn, kiuj publikiĝis en diversaj ĉinaj gazetoj. Multaj el liaj eseoj temas pri Esperanto — aŭ konigas la internan ideon de Esperanto, aŭ vivoplene priskribas lian E-aktivadon. Antaŭ kelkaj jaroj mi legis lian artikolon, en kiu li rememoris siajn E-amikojn en diver-

saj lokoj de la mondo. Li priskribis ne nur la personojn, sed ankaŭ la lokajn pejzaĝojn. Per sia lerta plumo li multe ĝuigis la legantojn. Tia bela artikolo diskonigas nian lingvon multe pli efike ol banala propagando.

Li postlasis verkojn kaj tradukaĵojn de 11 milionoj da ideogramoj. Fakte li kontribuis al la homaro pli multe ol la homaro donis al li. Tial mi volas diri al li: "La fabeloj de Andersen tradukitaj de vi restos ĉiam kiel kultura riĉaĵo por ĉinaj infanoj. Viaj verkoj kiel 'Montara Vilaĝo' diskonigas la mizeran pasintecon kaj feliĉan nuntempon de Ĉinio al pli multaj homoj de la mondo. Via kontribuo al la Esperanto-movado estas ĉiam laŭdata de la esperantistoj. Vi verkis 'Forgesitaj Homoj', tamen vi estos neniam forgesita. Kara Cicio Mar, vi diligente lernis kaj laboris dum la tuta vivo, nun vi povas ripozi en paco kun nenia bedaŭro." ■

Ye Junjian inter geknaboj





La aŭtoro kaj s-ino Morita Yoko

de WANG HANPING

MIA JAPANA AVINO

Tuj kiam mi atingis la kongresejon, mi vidis mian japanan avinon s-ino Morita Yoko. Ŝi aspektis sana kaj vigla kiel antaŭe. Se ŝi ne havus grizajn harojn, oni ne kredus, ke ŝi estas 80-jara. Jam pasis du jaroj de kiam ni disiĝis post la 1-a Azia Kongreso de Esperanto okazinta en Ŝanhajo en 1996. Mi tre ĝojis, ke ni renkontiĝis denove en la Esperanta kunveno.

Mi dankas Esperanton, ke ĝi interkonatigis nin. Mi unuafoje vidis ŝin en la simpozio "Lusin kaj Esperanto" okazinta en Ŝanhajo aŭtune de 1991. Post la simpozio ni kune vizitis la hejmlokon de Lusin en Shaoxing. Ŝi alte taksas Lusin kaj starigis amikajn rilatojn kun la edzino de nevo de lia japana instruisto Fujino Genkuro.

S-ino Morita Yoko naskiĝis en Taiwan. En la 40-aj jaroj ŝi estis en nordorienta Ĉinio. En 1990 ŝi revizitis Ĉinion kaj partoprenis en Pekino la 40-jaran

jubileon de "El Popola Ĉinio". Poste ŝi trifoje venis al Ĉinio por ĉeesti Esperantajn aktivadojn. Sed ni neniam havis pli da tempo por babili. Tial ni interkomunikiĝas per korespondo.

S-ino Morita Yoko komencis lerni nian lingvon en 1965. Tujare ŝi kaj ŝia edzo s-ro Morita Mosuke revenis de Danlando al Japanio. Survoje, sur ŝipo al Johamo, ili konatiĝis kun pola samideano Edmund Sidorowicz, kiu kun siaj amikoj veturis al Tokio por partopreni la 50-an Universalan Kongreson de Esperanto. Sur la ferdeko li instruis al ŝi Esperantajn vortojn kaj tiel ŝi kontaktiĝis kun Esperanto. S-ro Morita Mosuke estis profesoro pri arkitekturo, tial ankaŭ ŝi laboris pri tiu fako, tamen ŝi neniam ĉesis lerni la lingvon. En 1987 la geedzoj partoprenis en la 72-a Universal Kongreso de Esperanto en Varsovio. Ili sin preparis por konstrui Esperanto-Domon kaj donaci ĝin al la Japana Esperanto-Instituto (JEI). Sed, bedaŭrinde, s-ro Morita Mosuke forpasis en 1989, antaŭ ol la plano estis efektivigita. Por plenumi

la deziron de sia edzo, s-ino Morita Yoko dediĉis sian tutan energion al E-movado.

Por finkonstrui la Esperanto-Domon kiel eble plej frue, s-ino Morita Yoko transloĝiĝis en sian vilaon en la montaro Yatugatake. Tiutempe mi malmulte informiĝis pri ŝi, ĉar ŝi estis tre okupita de la domkonstruado.

En 1994 okazis en Seulo la 79-a Universal Kongreso de Esperanto. S-ino Morita Yoko esperis, ke mi gastos en la Esperanto-Domo post la kongreso. En 1995 ŝi invitis min kaj mian instruiston s-ro Laŭlum al kunveno okaze de la unujariĝo de la Esperanto-Domo. Mi ne akceptis la inviton pro tio, ke mi timis, ke tio tro multe ŝarĝos ŝin. Maje de 1998 ŝi denove invitis min al Japanio, asertante, ke tio havos grandan signifon por la amikeco inter la esperantistoj ĉinaj kaj japanaj. Kun granda ĝojo mi akceptis la inviton.

ESPERANTO-DOMO EN MONTARO

Unu el miaj ĉefaj vizitataj lokoj estis la montaro Yatugatake. En ĝi

kun japanaj esperantistoj (II)

kuŝas vilao konstruita de la geedzoj antaŭ 30 jaroj kaj ankaŭ la Esperanto-Domo, donaco por JEI. Post la 85-a Japana Esperanto-Kongreso mi vizitis la antikvan urbon Furukawa kaj primorajn vilaĝojn de Takayama kune kun s-ro Aoki, s-ino Morita Yoko kaj ŝia filino. Poste ni veturis rekte al la montaro Yatugatake. Vespere de la 6-a de oktobro ni atingis la Esperanto-Domon kaj nin akceptis s-ro Kurita Kimiaki, ĉefkomitatano de la Esperanto-Domo, kiu alvenis al ĝi tiun tagmezon el sia urbo. La Esperanto-Domo konsistas el du elegantaj dometoj. Unu el ili servas kiel biblioteko kun manĝejo kaj kunvenejo. En la dua etaĝo de la biblioteko estas ekspoziciejo pri Esperanto, kaj la alia estas tri-etaĝa dometo kun klasĉambro, oficejo, dormejo kaj duŝejo. Mi loĝis en la ĉambro Hirundo. Kvankam mi estis unuafoje en la domo, tamen ĝia Esperanta atmosfero sentigis min kiel hejme.

La montaro Yatugatake kun ok pintoj estas fama en Japanio. La Esperanto-Domo sidas en Nagasaka de Yamanasi, proksime de Tokio kaj de tie videblas Fuĵi-monto. Belaj pejzaĝoj ĉirkaŭas la domon.

La Esperanto-Domo arebas 300 kvadratajn metrojn. Ĝi estis inaŭgurita oktobre de 1994. Poste multaj esperantistoj feris aŭ aktivadis tie. S-ro Kurita Kimiaki diris, ke ĝi ne estas profita kaj la Administra Komitato por Esperanto-Domo de Yatugatake konsistas el 12 esperantistoj-volontuloj, kiuj deĵoras alterne. Tiuj membroj de JEI, kiuj

finis kurson, povas ricevi licencon disponi la domon en la tagoj sen deĵorantoj. La domo funkcias de marto ĝis novembro. Ĉiujare gastas tie centoj da japanaj kaj alilandaj samideanoj. Ĉiumonate okazas tie la Internacia Tago. En 1998 tie prelegis esperantistoj el Irano, Italio, Pollando, Kanado, Germanio kaj

saki-parkon, la hejmon de japana nacia papilio. En la papiliforma muzeo estas eksponataj specimenoj de diversaj papilioj. Tie okulfrapas vitrinoj de diverslandaj poŝtmarkoj pri papilioj, donacitaj de japana esperantistino. Ĉe la enirejo de la parko oni disdonis prospektojn en Esperanto. Inter-



La Esperanto-Domo

aliaj landoj. La 10-an de oktobro lastajare estis la Tago de Ĉinio. Tie mi prelegis pri la familia vivo de ĉinoj. Aŭskultis ankaŭ neesperantistoj.

Dum mia unu-semajna restado en la montaro mi kune kun s-ino Morita Yoko, s-ro Kurita Kimiaki kaj aliaj vizitis vilaĝan bibliotekon, aŭtomatan muzeon de muziko kaj arbaran vinfarejon. Krom ili, ni vizitis ankaŭ Oomura-

tempe mi donacis al la gastiganto ĉinajn papertondaĵojn pri papilioj.

La 8-an de oktobro mi rigardis Kofu, ĉefurbon de Yamanasi, kaj kunsidis kun lokaj samideanoj. Mia gastado ĉe japanaj samideanoj por mi estas neforgesebla: S-ino Shimo kondukis min rigardi ŝian rizkampon; s-ro Nobuo Yamaki montris al mi abundon da siaj poŝtmarkoj; kaj s-ino Orii Keiko ĝuigis al mi belan muzikon. ■



En la biblioteko de la Esperanto-Domo



De maldekstre: s-ro Ogihara, s-ro Kurita, la aŭtoro, s-ino Morita kaj s-ro Aoki post vizito al la Arta Muzeo de Yamanaŝi



S-ro Nobuo Yamaki (la dua de maldekstre) prezentanta siajn poŝtmarkojn al gastoj



Dum la Internacia Tago



Donacado de EPĈ
al la biblioteko
Ooizumi



Gastoj en la hejmo de
s-ino Orii Keiko



Konkurso

Strangaĵoj en piedpilka ludo de Ĉinio

de LI LIANG

LA nivelo de piedpilka ludo de Ĉinio estas tre malalta kompare kun aliaj sportbranĉoj, en kiuj ĉinoj gajnis mondajn kaj aziajn ĉampionecojn. Tamen en Ĉinio estas multege da piedpilko-manuloj. Estas ankaŭ aliaj strangaĵoj: la ĉina teamo malsukcesis en la kvalifika konkurso por la Mondpokala Piedpilka Konkurso, sed konstante multiĝas la enspezo de la ludistoj; intencis eltiriĝi el la piedpilka rondo la direktoro de la kluboteamo, kiu gajnis 4 ĉampionecojn dum la 5-jara profesia piedpilka konkurso de Ĉinio; la ludistoj en kategorio B eĉ ne deziras ludi en kategorio A, kaj iuj ludistoj eĉ ne volas eniri en la ŝtatan teamon...

PIEDPILKA KONKURSO EN LA MERKATO

En 1994 komenciĝis la profesia piedpilka konkurso de Ĉinio. La ĉinaj piedpilko-manuloj, kiuj antaŭe povis nur televidi konkursojn de Germanio, Italio kaj Britio, havas propran amuzejon. Multaj esperas, ke en la profesia piedpilka

konkurso progresos la ĉinaj ludistoj kaj la ĉina teamo sukcesos en la internaciaj matĉoj. La multfojaj malvenkoj de la ĉina teamo dolorigis la manulojn. Ili tamen havas pli da esperoj por la venontaj matĉoj. En la sekvaj 4 jaroj glate iris la profesia piedpilka konkurso. En 1998 la ĉina teamo malsukcesis en la kvalifika konkurso por la Mondpokala Piedpilka Konkurso en Francio, kio ankoraŭfoje ŝiris la koron de la manuloj. Poste okazis en la profesia piedpilka konkurso diversaj strangaĵoj, kiaj “falsa matĉo”, “nigra fajfilo” (maljusta juĝado)... Koncernaj raportoj saturis la amaskomunikilojn, kaj pli multaj ĉinoj ekatentis la piedpilkan ludon.

“FORT-ODORA TOŬFUO”

Laŭdire, ŝimis toŭfuo de iu pekinano, sed eksteratende ĝi odoras forte, tamen tre bongustas. Tiel fort-odora toŭfuo iĝis ŝatata manĝaĵo de ĉinoj. Iuj diris, ke la ĉina piedpilka ludo estas “fort-odora toŭfuo” — ĝi havas nenian atingon, tamen estas fokuso de atento de la publiko. Do ĝi estas preferinda por komercaj entreprenoj. Pro atento de amaskomunikiloj kaj ŝato de entreprenoj, piedpilko odoras eble iom strange. La honorario por unu matĉo de rezerva ludisto en kategorio B estas kelkdek- kaj eĉ cent-obla kiom la monata salajro de ordinara laboristo. Eĉ la elstaraj sportistoj de aliaj branĉoj ne povas enspezi tiel multe. En la evoluanta lando Ĉinio tio estas neimagebla. Iuj ludistoj en kate-

gorio B ne volas ludi en kategorio A nek en la ŝtata teamo, ĉar la lastaj ne pagas multe. Pro granda nombro de piedpilko-manuloj — granda merkato, multaj komercistoj entreprenas piedpilkan klubon. Tamen la merkato de la ĉina piedpilka ludo estas nematura. Kiom la komercistoj profitos de la grandega investo, tion neniu antaŭvidas. La komercistoj ne zorgas, ĉu ilia teamo bone ludas. Ili atentis nur tion, ke ili estas membroj de la piedpilka rondo. En la lastaj du jaroj, ĉe la fino de la profesia piedpilka konkurso, oni ne atentis, kiu gajnos la ĉampionecon — tio jam estas klara. Ili scivolemis pri tio, kiu falos sur malpli altan ŝtupon.

Por ke la ludistoj daŭre ludu en kategorio A aŭ B, iuj kluboj promesis al ili altan honorarion aŭ subaĉetis aliajn klubojn kaj eĉ la juĝistojn. La rezulto estas: la ludistoj ne plu bone ludas; la spektantoj vidas falsajn matĉojn; la ĉampiona klubo intencas eltiriĝi; kaj en iuj gravaj matĉoj oni devas inviti alilandajn juĝistojn.

Eble oni havas pretekston — la profesia piedpilka konkurso en Ĉinio estas nur 5-jara. En Ĉinio estas multaj ludistoj, juĝistoj, sportaj oficistoj kaj manuloj, kiuj vere amas piedpilkon. Tial ĝi daŭre estos fokuso de atento de la publiko. Iuj spektantoj diris: “Ni neniam rigardos piedpilkan konkurson.” Sed al la sekva matĉo ili ankoraŭ venas. Ili nur esperas, ke rapide progresos la piedpilka ludo en Ĉinio — kiel la fort-odora toŭfuo, kiu bongustas. ■



Urbeto de *pulu-oj*

Teksto kaj fotoj HU YUN

SEN ĉielskrapantoj, densaj amasoj da homoj kaj torento da aŭtoj la urbeto Jiedexiu en Tibeto diferencas de urbetoj en aliaj regionoj per apartaj kvieteco kaj modesteco.

La urbeto kun pli ol 600 familioj situas apud la ŝoseo kondukanta al la ĉefurbo de Tibeto — Lhasa, je malpli ol 100 kilometroj for de ĝi. Pro tio, ke ĝiaj loĝantoj vivtenas sin ne nur per terkulturado kaj brutobredado, sed ankaŭ per teksado de *pulu-oj* (*pulu-o* estas ĝenerala nomo de tradiciaj lanteksaĵoj en Tibeto), la urbeto ricevis la nomon “urbeto de *pulu-oj*”. Sur stratoj preskaŭ ĉiuj homoj havas spindelon en la mano, kaj estas mirinde, ke ankaŭ viroj lerte turnas la spindelon kaj tordas lanfadenojn.

Tre mallarĝaj estas la stratoj en la urbeto, kie tipe tibetaj domoj havas altajn murojn masonitajn el

ŝtonoj, kun korto ĉirkaŭigita per adoba muro. Same kiel en aliaj lokoj de Tibeto, tie super ĉiu loĝdomo alte pendas bonaŭgura sutro-flago.

Trapasinte vojeton, mi eniris la hejmon de Mima Ĝoka. Ŝi estis teksanta sidante ĉe la lignoteksilo, kaj apud ŝi estis korbeto, en kiu estas navedoj kun diverskoloraj lanfadenoj. La domo estas du-etaĝa: en la unua estas stalo kaj en la dua — dormoĉambroj por 8 familianoj. Sur la balkono troviĝas, krom floroj, ankaŭ ŝpinilo kaj teksilo. Ĉiu familiano scipovas teksadon. Mima Ĝoka diris, ke jam antaŭlonge la urbanoj ekokupiĝis pri teksado. Ili ellernis la metion en la infaneco. Ŝia frato elprenis *pulu-on* kaj diris al mi, ke tio estas tibet-stila litkovrilo, kaj oni venos aĉeti iliajn produktaĵojn. En lia ĉambro mi vidis ankaŭ multajn aliajn belajn litkovrilojn vendotajn en aliaj lokoj.

Materialoj de *pulu-oj* estas diversaj. La plej luksaj teksaĵoj estas el silko. Estas bonkvalitaj kaj delikataj ankaŭ teksaĵoj el lano

tondita ĉe la kolo de ŝafoj. La plej simplaj *pulu-oj* estas uzataj por fari tibet-stilajn robojn, frokojn kaj antaŭtukojn. Ankaŭ Mima Ĝoka teksas simplajn antaŭtukojn kun kalfkolora fono kaj bluaj strioj.

Desegnoj de *pulu-oj* konsistas ĉefe el horizontalaj strioj kaj la koloroj estas riĉaj. En iuj lokoj de Tibeto virinoj portas antaŭtukon ekde sia knabineco, sed en Lhasa nur la edzinoj rajtas ĝin porti kaj neniam forlasi, dum la edzoj vivas, alie okazos laŭdire malfeliĉo. Ĝenerale junaj virinoj ŝatas antaŭtukon brilkoloran, dum maljunaj simplan.

La antaŭtukoj povas protekti la robojn de virinoj kontraŭ difektiĝo kaj ŝirmi iliajn manojn de varmega kaldron-tenilo. Tial *pulu-oj* kiel materialo por fari antaŭtukojn estas multe postulataj kaj tiuj de Jiedexiu estas plej bonvenaj. Pro la belaj *pulu-oj* la urbeto famiĝis ne nur en Tibeto, sed ankaŭ en tibetnaciaj regionoj de Qinghai- kaj Sichuan-provincoj. ■



Pulu-teksado

Antaŭ vendejo de *pulu-oj*






Loğdomo en la urbeto
Foto de WEI XIUTANG



Fadeno-tordado
Foto de TANG TAO

Strateto Foto de LIU QIJUN



Ĉu ŝi rajtas ricevi la heredaĵon?

Scivolema mi estas pri rajtoj de gefiloj por gepatraj heredaĵoj. Ĉu virinoj rajtas instrui ĉe universitato?

Julinha Zoraide Feijo Pereira (Brazilo)

de XIANG HONG

HISTORIE la ĉinoj rigardis viron digna kaj virinon humila. Ĝenerale nur viroj havis heredan rajton. Nun tia tradicio estas kritikata kaj forigata. Se okazas konflikto pri heredaĵo, la leĝo pri heredeco ludas definitivan rolon.

Tiun jaron, kiam Qin estis 9-jara, ŝiaj gepatroj divorcis. Ŝi estis aljuĝita al la patrino, kaj ŝia pliaĝa frato al la patro. Poste la gepatroj reedz(in)iĝis respektive. Post 25 jaroj, kiam Qin informiĝis pri la morto de la patro, lia figuro jam paliĝis en ŝia memoro. Tamen kelkajn noktojn la patrino de Qin ne bone dormis, ĉar ŝi informiĝis, ke ŝia eksedzo postlasis sufiĉe grandan heredaĵon. Ŝi opiniis, ke Qin, filino de la mortinto, rajtas ĝui parton de la heredaĵo. Pri tio ŝi interkonsiliĝis kun parencoj de la eksedzo. Sed la lastaj ne agnoskis la heredan rajton de Qin, ĉar ŝi en la pasintaj 25 jaroj neniam kontaktiĝis kun sia patro nek plenumis la filinan devon. Tiuokaze la konfliktantaj du flankoj konsultis advokatojn.

Ĉu Qin havas rajton heredi posedaĵon de la patro?

Laŭ ĉina leĝo, heredado estas laŭvica: la unuavica heredantoj estas edz(in)o, gepatroj kaj gefiloj; la duavica — gefratoj kaj geavoj. Dume

oni devas sekvi jenajn principojn:

A. Laŭvica heredado. Unue la heredaĵo estas dividita inter la unuavica heredantoj, tiam la duavica ne rajtas partopreni la heredadon; nur tiam, kiam la unuavica heredantoj ne ekzistas aŭ ili ĉiuj rezignas sian heredan rajton, la duavica rajtas ĝui la heredadon.

B. Egaleco. Dum la heredado egalrajtaj estas viroj kaj virinoj, kaj heredantoj en la sama vico; eksteredzeca gefiloj, adoptaj gefiloj kaj vivtenitaj duongefiloj estas egalrajtaj kiel ordinara gefiloj.

C. Unueco de rajto kaj devo. La heredaĵo estas distribuata laŭ la vivtenado de la heredato far la heredantoj. Tiu, kiu multe plenumas la devon, heredas multe.


Krome, ankaŭ estas principoj de interkonsiliĝo kaj iagrada favorado. La unua temas, ke la samvica heredantoj povas dividi inter si heredaĵon per interkonsiliĝo; la lasta temas, ke oni devas doni favoron al la heredantoj neplenaĝaj aŭ sen laborpovo.

Ke Qin ne kontaktiĝis kun la patro en 25 jaroj, tio ne ŝanĝis la fakton, ke ŝi estas lia filino. Tial ŝi rajtas ricevi heredaĵon, kiel unu el la unuavica heredantoj. Plie, ĉar de la infaneco ŝi vivis kune kun la duonpatro, kiu vivtenis kaj edukis ŝin, tial laŭ ĉina leĝo inter ili formiĝis rilatoj pri rajtoj kaj devoj, kompreneble inkl. de tiuj pri reciproka heredado, same kiel in-

ter propraj patro kaj filino. Tial ŝi povas ricevi ankaŭ heredaĵon de la duonpatro en la estonteco.

Krome la ĉina leĝo difinis ankaŭ aliajn du heredajn metodojn: laŭ testamento herediĝi aŭ donaci. Se oni skribas validan testamenton antaŭ sia morto, la distribuado de ties propraĵo fariĝos pli facila.

S-ino Pereira demandis, ĉu ĉinaj virinoj rajtas instrui en universitato. Ni donas respondon kiel jene: En Ĉinio la Leĝo pri Defendo de Rajtoj de Virinoj difinas, ke la ŝtato garantias, ke la virinoj ĝuos egalan labor-rajton kiel la viroj. Tio signifas, ke la leĝo donis al la ĉinaj virinoj rajton sin okupi pri ĉia profesio, inkl. de instruado en universitato. Laŭ freŝa informo, en la 67 altlernejoj de Pekino laboras 7 000 profesorinoj kaj vicprofesorinoj, kiuj konsistigas trionon de la geprofesoroj kaj gevicprofesoroj en la urbo. La nombro iagrade spegulas la situacion de ĉinaj virinoj. Kun la socia evoluo pli kaj pli altiĝis la enoficiĝa procentaĵo de virinoj, kaj ĝia kreskado estas pli rapida ol tiu de viroj. Sed pro kialoj historiaj kaj sociaj la konkura povo de virinoj por enoficiĝo estas malpli forta ol tiu de viroj. Precipe en iuj kampoj ekz. pri scienc-teknika esplorado kaj administrado, la proporcio de virinoj estas malpli alta ol tiu de viroj. Tamen la fenomeno iom post iom ŝanĝiĝas. ■



Poezio en akvarelo

S-ro Liu Xinsheng

de PANG NAIYING

EN printempa pluveto verdas montoj malproksimaj, super lago glimanta pompas bunta ĉielarko, ĉirkaŭ maljuna arbo densas matena nebulo... Jen akvarelo de s-ro Liu Xinsheng. Mi ĝuis ĝin kiel poemon kun lirikismo kaj implico... La tradicia ĉina estetiko alte taksas pentraĵojn poeziajn. Ĝuste liaj akvareloj, okcident-devenaj, portas orientan guston.

La poemoj pentras la naturon. S-ro Liu diris, ke li estas filo de la naturo. Nur kiam li estas en la naturo, li sentas ĝojon. Do li ŝatas ekskurson: li suriris la firston de la mondo — Tibeton, por renkonti neĝkovritan monton; li eniris Turpan-basenon por ricevi impreson de kruela suno; li transiris dezerton de nordokcidenta Ĉinio por sperti solecon de vivo; li vojaĝis al la sudokcidenta landlimo por spekti la pejzaĝon de tropika pluvbarbaro... Anstataŭ la vereco de


konturo, li substrekas prezentadon de la naturo en sia koro. La serio "Blankaj ĉevaloj" reprezentas lian stilon — sub la blua ĉielo blankaj ĉevaloj aŭ promenas aŭ staras aŭ kuras. Ili ne estas ŝarĝitaj nek jugitaj. En la pentraĵo la ĉielo estas blua, ankaŭ la stepo estas blua. La klareco de la pentraĵo similas al blua kristalo — jen la pura naturo en lia koro.

Verŝajne Liu Xinsheng estas malproksima de la konfuza reala mondo kaj vivas nur en la naturo kaj sia sonĝo. Tamen li diris, ke ankaŭ la malsukcesajn verkojn li ŝatas, ĉar ĉiu lia pentraĵo estas parto de lia vivo kaj sonĝo... La nomo de la ekspozicio de liaj verkoj en Singapuro en 1995 estas "Sonĝo". Lia verko "Sonĝo de betulo" estis dediĉita al iu knabino. En tiu jaro li pentris en Altajo, kvazaŭ enirinte la mondon de betuloj. Maljunulo rakontis al li, ke antaŭe iu bela knabino sin dronigis en la lago por protesti kontraŭ la tribestro, kiu intencis edzinigi ŝin. Poste sur la

bordo kreskis multaj betuloj. Por rememori ŝin, oni translokis la betulojn al ĉiuj lokoj de Altajo... Aŭskultinte la rakonton, s-ro Liu pentris betulon, kiu blankas kiel jado. Ĝi pene eliras el inter ŝtonoj kaj rekte stariĝas sub la ĉielo. Nebulo vualas ĝin. Ĉu tio ne estas libera sonĝo de la knabino?

Pro tio ni komprenas la lirikismon de s-ro Liu, ke tio estas la plej bona metodo por esprimi sonĝon. Rigardante la dancantajn neĝerojn, la pompe florantajn persikajn florojn kaj la forvelkintajn florojn falintajn en akvon en lia pentraĵo "Sudo de Yangzi-rivero kiel sonĝo", oni rememoris la akvolandon sude de Yangzi-rivero, kie en printempo ĉie estas floroj. Oni ebriiĝis de la belaj sonĝoj.

Liu Xinsheng estas lerta en uzado de farboj kaj akvo por reliefigi lirikismon. Oni nomas liajn pentraĵojn "malsekaj pentraĵoj". Li foje-refoje penike frotas kaj ŝmiras per farboj kaj akvo, por ke la tuta pentraĵo aspektu nebula. ■




"Freša verdeco"



"En matena nebulo"

"Songô de
betulo"



"Sudo de Yangzi-rivero
kiel songô"

BENXI estas fama urbo en nordorienta Ĉinio pro siaj karbo kaj fero. Dank' al ekspluatado de la naturaj kaj kulturaj pejzaĝoj en la lastaj jaroj, ĝi fariĝis ankaŭ turisma urbo.

Benxi estas loko montoza, akvoriĉa kaj abunda je diversaj vegetaloj. Tie estas ŝtataj forstumejoj. La vidindejo Pordoferma Monto estas unu el ili. Tie la du montpintoj staras unu kontraŭ la alia kvazaŭ du pordklapoj. Sur la monto kreskas multaj aceroj. En aŭtuno, iliaj folioj ruĝiĝas, speguliĝas en klaraj rojoj. En mateno kaj post pluvo super la monto ĉiam ŝvebas nuboj. Cervoj kaj aproj vivas tie. Hazarde oni povas vidi ankaŭ ursojn.

En Benxi estas ankaŭ multaj

kulturaj vidindaĵoj. La Ferotempla Monto estas la originejo de taoismo en nordorienta Ĉinio. En la jaro 1630 Guo Shouzhen monaĥiĝis ĉi tie. Nun sur la monto ankoraŭ estas taoisma templo. Sur Wunŭmonto konserviĝas antikva urbo, kie estis lulilo de la antaŭuloj de manĉuroj. Ĝi estas unu el la gravaj historiaj lokoj de Ĉinio.

Ankaŭ la tieaj riveroj kaj fontoj estas allogaj. Tie estas ne nur termofontoj, sed ankaŭ granda karsta kaverno. Samkiel aliaj kalkŝtonaj kavernoj, ĝi havas multe da groteskaj stalaktitoj. La kaverno longas ĉ. 5 000 m. Fakuloj opinias, ke tie la rivero profunda je 7 m. eble estas la plej longa kaverno kun subtera rivero en la mondo.

La aperturo de la kaverno en formo de lunarko larĝas ĉ. 6 m. Interne de ĝi la temperaturo estas

10 °C tutjare. Por preventi malvarmumiĝon en somero la administrejo de la kaverno eĉ pretigis surtutojn al la vizitantoj.

Ĝenerale la temperaturo de tieaj termofontoj estas 40 °C, kaj ie ĝi eĉ atingas 76 °C. Vintre, kiam en aliaj lokoj de nordorienta Ĉinio regas glacio kaj neĝo, dense vaporas la termofontoj en Benxi. La akvo de la fonto estas efika por kuraci artriton kaj reŭmatismen.

La plej distinga en Benxi estas nenormaleco de ĝia tera temperaturo. En la areo de ĉ. 12 kvadrataj kilometroj oni trovis kvar lokojn kun nenormalaj teraj temperaturoj. Iuj lokoj tutjare malvarmas, glaciĝas eĉ somere. Aliaj tamen tutjare varmas, vegetaloj prosperas eĉ vintre. Oni diras, ke tia fenomeno ja ne estas rara, tamen tiel tipa fenomeno de geotermo kia en Benxi estas tre malofta. ■

Vojaĝo en Benxi



“Heroa nodo” kaj brodita tuko

Teksto kaj fotoj de HAN HONG

Tradiciaj vestoj de ji-oj havas multajn formojn. Viroj ĝenerale portas supran veston kun mallarĝaj nigraj manikoj kaj pantalonon kun larĝaj multfaldaj krurumoj. Ĉirkaŭ la kapo vindiĝas nigra aŭ malhelblua tuko, en formo de konuso, kiu similas al korno. Oni rigardas la konuson kiel ion sanktan kaj nomas ĝin “heroa nodo”.

Virinoj portas borderitan aŭ broditan veston kaj longan multfaldan jupon. Sur la rando de jupo estas multtavolaj koloraj toloj. La ornamaĵo sur la kapo montras, ĉu la virino estas lerta aŭ ne. La brodita tuko beligas virinojn.

Kiam ili iras eksteren, ili portas mantelon kun longa kvasto. La mantelo farita el lano longas ĝis la genuoj. Vespere ĝi servas kiel litkovrilo.



Ĝeamantoj



Brodado de vestoj kiel doto



Ji-a knabino



Virinaj ĉapoj en formo de alero




Junaj virinoj en festaj vestoj



Maljunulino kun kaptuko kaj orelingoj




Ji-a maljunulo en mantelo kun longa kvasto



Ji-a junulo kun "heroa nodo" surkape



Maljunaj geedzoj



La medi-protektita

nokte ili dormis en tendoj.

En la naturparko Dafeng de Yancheng en Jiangsu-provinco vivas pli ol 300 elafuroj (*Elaphrus davidionus*). Tie la ekspedicianoj konstruis vojetojn, barilojn kaj observoturojn inter ĝistaliaj alopekuroj.

Multaj ekspedicianoj unuafoje vizitis Ĉinion. Brita fraŭlino Frona diris, ke antaŭ la vojaĝo al Ĉinio ŝi legis libron pri la ĉina kultura revolucio. Tiam ŝi ne komprenis, kial tiel multaj valoraĵoj kaj belaĵoj deŝtruiĝis en Ĉinio. Ĉi-foje ŝi pro

Elafuroj en la naturparko Dafeng



Renkontiĝo sur la Granda Muro


Teksto kaj fotoj de DA WEI

La 10-an de julio 1998, 120 junuloj el Britio, Argentino, Italio, Omano, Singapuro, Ĉinio ktp. kolektiĝis en Ĉinio por partopreni Raleigh-ekskursion en Ĉinio en 1998, titolitan "Beligu la Medion". La eks-

pedicio okazigis inaŭguron sur la Granda Muro en la antaŭurbo de Pekino, kaj poste la ekspedicianoj en du grupoj veturis al Shandong-kaj Jiangsu-provincoj. Tie ili iris profunde en malproksimajn vilaĝojn. Tage ili laboris en naturparko kaj helpis konstrui elementajn lernejojn "Espero",

ekspedicio


Brita fraŭlino
Marion el-
laboranta
labor-plan-
on




praokule vidis multajn natur-
parkojn kaj multajn homojn
laborantajn por protekti birdojn
kaj bestojn. Tio tute ŝanĝis
ŝian impreson pri Ĉinio.

Dum labor-paŭzo

Ekspedicianoj konstruas barilon en la naturparko



Konstruado de elementa lernejo "Espero"



Al fofojo

LANDLIMA URBETO DONGXING

Teksto kaj fotoj de WANG ENPU

Dongxing situas en Guangxi, Ĉinio, kaj trans la rivero estas Vjetnamio.

En Dongxing la klimato mildas kaj riĉfontoj abundas. Tie produktiĝas cinamoj, stelano, teo kaj fruktoj; delikataj ŝtonskulptaĵoj kaj bambuplektaĵoj vendiĝas en Sudorienta Azio, Ameriko kaj Eŭropo; kaj la pejzaĝo

allogas turistojn el aliaj landoj.

Nun en Dongxing la landlima komerco pli kaj pli prosperiĝas. Ĉiufoje, kiam okazas foiro, vjetnamoj ĉe la landlimo frumatene veturas al Dongxing per boatoj plenaj de diversaj lokaj produktoj. En la foiro ili vendas siajn komercaĵojn kaj aĉetas salon, vestojn, ŝuojn ktp. Dank' al prosperiĝo de la landlima komerco, la produktado kaj vivo de la ambaŭflankaj landlimaj loĝantoj pliboniĝis rimarkinde.

Foiro





Malgrandaj bestoj ŝatataj en foiro


Rikolto



Agrikulturaj maŝinoj facile vendataj



Por ke ĉiuj havu brilajn okulojn



Prof. Song Weixian analizanta kazon kun juna kuracistino

de ZHU JING

SONG Lin estas mia bona amikino. Pere de ŝi mi konatiĝis kun ŝia patro, oftalmologo, profesoro Song Weixian. En la tago de nia interkonatiĝo la televida stacio telesendis la programeron: Tago de Okuloj — protektu viajn okulojn. Sur ekrano aperis intervjuo de raportisto kun prof. Song.

Prof. Song finis sian studentan vivon en iu medicina instituto en 1965, kaj post tio li eklaboris en fama oftalmologia hospitalo de Pekino. En la komenco de la 90-aj jaroj li studis en Japanio. Tie li konis, ke jam multe ŝanĝiĝis la traŭmatismaj okulmalsanoj: Kun leviĝo de la nivelo de mekanika laboro, reduktiĝis la malsanoj kaŭzitaj de io trafinta en la okulojn kaj brulvundo de kaŭstika sodo k.a. Sed pro leviĝo de la nivelo de la popola vivo, ŝanĝiĝo de trafikiloj, populariĝo de sportoj kaj pliiĝo de aŭto-akcidentoj, la vundoj sur vizaĝo ofte kaŭzas damaĝon al okuloj, kaj plie pilkoludo kaj bokso ofte kaŭzas okulmalsanon. Jen li elektis por si novan temon — kuraco kaj riparo de traŭmatisma orbit-rompiĝo kaj enplantado de artefarita kristalo.

Estas viro, kiu vundiĝis en trafika akcidento. Oni suturis al li la haŭtan vundon, sed neniel povis vidi unu el liaj okuloj. Ekzameno montris, ke tiu okulglobo moviĝis en la nazsinuson kaj plie la orbito rompiĝis. Tio estas operacio kun granda risko. Prof. Song senprokraste faris al li la operacion por restaŭri la okulglobon, sed la okulglobo malsupreniĝis, kaj li devis ripari la orbiton. La orbita muro estas maldika kiel papero, kaj la optika nervo komplika kiel reto. Ĉio ĉi faris la operacion ege malfacila. Tamen la serioza profesoro ne nur bone riparis la orbiton de la malsan-

ulo, sed ankaŭ restaŭris la aspekton kaj vidadon de lia okulo.

Por prof. Song la plej kortuŝaj kaj neforgeseblaj estas la tagoj, kiam li laboris en Tibeto por kuraci kataraktulojn. En Tibeto la morbokvanto de katarakto estas tre granda. Mazhokunggar, kie laboris la kuracista taĉmento de prof. Song, estas maldense loĝata gubernio kun ekonomio estiĝinta kaj kuracaj kondiĉoj malbonaj. Tie la elektra livero ne estas konstanta, kio faris la operaciojn tre malfacilaj. Iam oni devis fari operacion kun helpo de poŝlampoj. Dum du semajnoj ili faris operaciojn al pli ol cent homoj. Estas maljunulo Lazi, kiu perdis la vidadon antaŭ 5 jaroj pro katarakto. Post kiam li reakiris la vidkapablon, li surgenuje diris al la kuracista taĉmento: “Koran dankon al vi!” Kiam la kuracista taĉmento forlasis la lokon, multaj homoj venis adiaŭi la kuracistojn, kun blankaj silkaj rubandoj en la manoj kiel donaco.

Antaŭvespere de la Printempa Festo prof. Song faris sep operaciojn por enuklei okulglobon. La operaciitoj ĉiuj vundiĝis de eksplodo de petardoj. La akcidento forte ĉagrenis lin kaj li telefonis al la urbestro: “Eksplodo de petardoj ja celas pliigi la festan etoson, tamen en la pasintaj 10 jaroj pli ol 1 800 homoj blindiĝis pro eksplodo de petardoj. Juĝate laŭ medicino, la petardoj ne povas esti plu rigardataj kiel amuzajoj. Mi estas okulisto. Mi havas devon protekti la homajn okulojn.” Poste la urba registaro publikigis dekretan por malpermesi petardojn.

En la pasintaj 30 jaroj prof. Song faris multe da operacioj. Li diris: “Mi estas fiera, ke mi estas kuracisto. Mi ĝojis, kiam la malsanuloj diris al mi ĝisrevidon kun resanigitaj okuloj. Tio estas granda feliĉo por mi.” ■

Kulturo sur la haŭto

de PANG NAIYING

ŜAJNAS, ke ĉiuj nacioj havas tatuan moron. Amerikaj indiĝenoj tranĉas la haŭton kaj ŝmiras salon en la vundojn por ricevi elstaraĵojn, opiniante, ke ju pli la cikatroj dikas, des pli ili belas; nuba-aj virinoj de Sudano tatuas sian korpon tri-foje en la vivo, vundante al si preskaŭ la tutan haŭton, kaj nur post tio ili povas fariĝi "belulinoj"; kaj laosaj viroj fieras pri tatuitaj drako kaj tigro sur la tuta korpo...

Tatuaĵojn faris kaj faras ankaŭ diversnaciaj ĉinoj antikvaj kaj modernaj. Sur koloraj ceramikaĵoj faritaj dum neolitiko kaj elterigitaj en Gansu, Qinghai kaj aliaj lokoj en nordokcidenta Ĉinio estas desegnoj pri homa vizaĝo kun haŭtaj makuloj aŭ strioj de leoparda kato, tigro, leopardo kaj aliaj bestoj. En historiaj libroj legeblas notoj pri barbaroj kun tatuitaj vizaĝo kaj piedoj aŭ kun nigritaj dentoj. Fakte, ĉu tatuado ĉu dento-nigrigado, per kiuj oni sin beligis, prezentas la nacian kulturon. Ili estas tre gravaj por la historia kaj kultura heredado kaj disvastigo de la etnoj sen skriba lingvo.

SIGNO DE PRAPATROJ

Ĉiuj nacioj havas siajn proprajn tatuaĵojn. Rigardante sin kiel posteulojn de tigro, ji-oj, vivantaj en Yunnan, sudokcidenta Ĉinio, tatuas tigron sur la haŭto. Prenante serpenton kiel sian prapatron, Paiwan-anoj de Gaŭŝan-nacio loĝantaj en Taiwan tatuas serpenton sur la haŭto. Kiam serpento endomiĝas, ili traktas ĝin kiel prapatron kaj preparas festenon por bonvenigi ĝin; kaj kiam ĝi eldomiĝas, la mastro diras kun bastono en la mano: "Prapatro, mi akompanos vin." Li lasas la serpenton volviĝi ĉirkaŭ la bastono kaj eskortas ĝin al arbaro.

La totemo tatuita sur la korpo servas ankaŭ kiel etna signo. Kemu-oj en Yunnan opinias, ke kun tiu signo oni povas trovi la prapatrojn post sia morto. Laŭ ĝingpo-oj, la plej kontentiga fino de la homa vivo estas postmorta renkontiĝo kun la prapatroj kaj oni povas trankvile vivi kaj labori nur post kiam oni bone aranĝas la funebraĵojn por la mortinto. Tial por la funebra ceremonio oni sendas 8 junulojn al pro-

funda arbaro kaj laŭ peto sorĉisto tatuas ilin de la vizaĝo ĝis la piedoj per ruĝa, nigra kaj blanka koloroj. Post tio ili fariĝas "fantomoj" el alia mondo kaj kondukas la animon de la mortinto al la loko, kie estas liaj prapatroj...

HEROA MEDALO

Taj-oj en Yunnan kredas je la Malgranda Vehiklo. La 7-8-jaraj knaboj estas sendataj al budhisma templo por sutro-lernado. Antaŭ ol adeptigi ilin, oni tatuas sur ilia haŭto pagodon, sutron, aforismon kaj sorĉvortojn aŭ kuriozajn vegetaĵojn, birdojn kaj bestojn de la tropika pluvarbaro, en kiu ili vivas.

Tatuado kaŭzas grandan doloron al la homa korpo. La tatuitoj devas havi firman volon kaj kredon. Ju pli multajn kaj komplikajn tatuaĵojn viro havas, des pli bela kaj brava oni lin rigardas. Tio estas kriterio por virinoj elekti amaton. La viroj ne klerigitaj en templo nek havantaj tatuaĵojn sur la korpo estas malestimataj. Pro tio taj-aj viroj preferas tatui la tutan korpon, eĉ la frunton, postajojn, akselojn kaj umbilikon. Nobeloj tatuas sin per ruĝa koloro kaj malriĉuloj per la nigra. Ĉu nobeloj ĉu malriĉuloj, ili ĉiuj fieras pri la tatuaĵoj sur la tuta korpo kaj prenas ilin kiel heroajn medalojn. Tatuaĵoj, ili rememoras sian heroan prapatron: Antaŭe, en la ĉielo ne estis suno. La teron prilumis brila perlo sur *Bodhi*-arbo. Poste la perlon ŝtelis demono. Iu junulo decidis trovi ĝin. Li faris penigan vojaĝon tra vasta arbaro, trans montoj kaj riveroj, kaj nodis lianon por signado de vojo, tamen li perdiĝis. Li do pentris sur sia korpo pejzaĝojn laŭ la vojo per nigra arbosuko, sed ili estis forlavitaj de pluvo kaj ŝvito. Tiam li senhezite tranĉis al si la haŭton per dornoj kaj enigis la nigran sukron en la vundojn. Post kiam lia tuta korpo kovriĝis de desegnoj, li retrovis la perlon kaj hejmen revenis dank' al la signoj sur la korpo, nelonge poste li forpasis... Ekde tiam la lokanoj pli kaj pli respektas budhismon kaj rememoras lin per tatuado.

PASPORTO DE JUNEKO

Li-aj virinoj ricevas tatuadon ekde sia adoleskan-

teco. Oni tatuas unue ilian vizaĝon kaj poste iliajn bruston, dorson, brakojn, gambojn kaj piedojn dum 7-10 jaroj, ĝis ili edziniĝos. Kiam knabino atingas la tatan aĝon, la gepatroj devas konstrui por ŝi apartan dometon. Post tio ŝi rajtas amikiĝi kun knaboj. Se ŝi enamiĝas al iu, ĉi tiu do tatuas apartan signon sur ŝia mano.

Han-oj opinias, ke belas okuloj brilaj kaj dentoj blankaj, sed por taj-aj virinoj la blankaj dentoj de han-aj viroj malbelas kiel tiuj de ĉevaloj. Taj-aj geknaboj ekŝmiras en la adoleskanteo siajn dentojn per fulgo el kaŝtanarbo. Antaŭ la geedziĝa ceremonio la novedzino devas plinigri siajn dentojn.

Blang-aj gejunuloj ofte renkontiĝas ĉirkaŭ fajro en aŭtuna vespero aŭ en religiaj tagoj. Ili faras fulgon el branĉoj kaj reciproke nigriĝi la dentojn. Je tio ili debutas en am-afero.

AMULETO

La nacioj, kiuj sin tatuas, plejparte prenas tatuajon kiel amuleton, opiniante, ke ĝi povas forpeli malbonon kaj protekti la tatuiston. Taj-aj viroj tatuas la dorson de la oreloj. Laŭdire, tio povas kaŭzi prognozajn tremetojn al la oreloj antaŭ alveno de katastrofo. Ili tatuas ankaŭ sutron kaj sorĉvortojn sur la brakoj, opiniante, ke tio povas defendi ilin kontraŭ ĉia danĝero.

Influite de taj-oj, ĉiuj komercistoj de ĉevalaj karavanoj vojaĝantaj inter Yunnan kaj Birmo sin tatuas por eviti atakon de malsanoj kaj garantii la sekurecon dum la vojaĝo. Ĉar pasintec en la subtropika pluvbaro ofte furoris epidemioj, la komercistoj venintaj el aliaj lokoj certe petas taj-ajn tatuistojn tatui ilian korpon. Kvankam ili parolas malsamlingve, tamen estas sufiĉe por la tatuotoj fingrumi la deziratajn desegnojn en tuta libro. Iu 80-jara han-o diris, ke en sia juneco li petis tatui sur la genuoj po unu tigran kapon, sub ili po unu volviĝantan serpenton kaj sur la brusto drakon. Kun la tatuajoj li kuraĝis konduki ĉevalojn trans senhomaj montaro kaj arbaro.

FAMILIA ADMONO, POEMO, PENTRAĴO KAJ ALIAJ

En la dinastioj Tang kaj Song (7-13 jc.) furoris tatuado inter han-oj. La patrino de Yue Fei, nacia heroo, tatus jenajn vortojn sur la dorso de sia filo: "Estu fidela kaj sinoferema al la patrolando!" Tio estis eksterordinara familia admono. Iuj tatus sur la tuta korpo poemojn de Tang-dinastio kun ilustraĵoj, aliaj — pejzaĝojn, kaj triaj — gigantan serpenton:



Tatuita taj-o

ĝia kapo kun larĝe malfermita faŭko estas sur la dekstra mano kaj ĝia vosto etendiĝas ĝis la maldekstra kruro. Laŭdire iu vagabondo, kiu estis kaptita kaj punita de policianoj ofte pro interbatalo, tatus sur sia dorso portreton de ĉiela reĝo budho-protectanta. Poste, policianoj ne kuraĝis bati lin, vidinte la portreton.

En la sklava socio sklavoposedantoj ofte tatus la vizaĝon de siaj sklavoj por puno eĉ pro ilia malgranda eraro kaj sendis ilin gardi la pordegon. Kun signo sur la vizaĝo ili ne povis forkuri.

Modernaj virinoj sin beligas per brovo-pentraĵo kaj lip- kaj ung-ŝminkado iom simile al tatuado. Kvankam la operacio por pufigi mamojn kaj elstarigi nazon malsamas al tatuado, tamen tio same turmentas la operaciiton. Hodiaŭ iuj ĉinaj kaj alilandaj nacioj ankoraŭ alte taksas tatuadon. Dum la 6-a Internacia Foiro de Tatuado okazinta en marto 1981, iu knabino kun nigra jupo altiris la atenton de ĉiuj klientoj en restoracio per sia strikta "vesto" kun elegantaj desegnoj en la koloroj ruĝa, blua kaj verda, sed kiam ŝi alproksimiĝis, la ĉeestantoj surpriziĝis de miro, ĉar ŝia bela "vesto" estas nenio alia ol tatuado. ■

MELODIOJ TRANSOCEANAJ

Popmuziko estas intima amiko de junuloj. Iuj ĉinaj junuloj ne nur ŝatas kantistojn de la ĉeftero, Hongkong kaj Taiwan, sed ankaŭ estas fidelaj aŭskultantoj de kantistoj el Eŭropo kaj Ameriko. Muziko ne konas landlimon. La melodioj de la Okcidento eĥe resonas ankaŭ en Ĉinio.

Yu Tao

de WANG JIANBING

EN Ĉinio en radio ofte aŭskulteblas popmuziko, sed en televido malofte. En la Ĉina Centra Televido kaj lokaj televidioj ankoraŭ ne estas kanalo aparte por popmuziko. Ili nur en difinita tempo dissendas muzikajn programojn produktitajn de Ĉinio.

RADIO-STACIO KAJ SONBENDO

Muzikaj amantoj de Ĉinio konas alilandan popmuzikon ĉefe el la radio-stacio kaj sonbendo. Ekz. inter la frekvencoj ĉiutage riceveblaj en Pekino estas 4, kiuj disaŭdigas ĉefe muzikon kaj prezentas ankaŭ alilandan popmuzikon.



Prezentado de popkanto sur strato

“Leĝera FM”, produktita de la Ĉina Radio Internacia, estas la plej plaĉa programo. Tage kaj vespere respektive estas geanoncista paro, kiu gvidas la programon. La programo informas aŭskultantojn pri plej nova popmuziko de Eŭropo kaj Ameriko kaj prezentas kantojn petitajn de la aŭskultantoj. La aŭskultantoj plejparte estas studentoj kaj junaj laborantoj de alilandaj entreprenoj en Pekino.

La aliaj tri frekvencoj ĉiutage regule prezentas belajn popkantojn de Eŭropo kaj Ameriko kaj elsendas kelkajn el ili. Tiuj programoj ĝenerale estas faritaj kune de la radio-stacio kaj entreprenoj, ekz. “Nesto-kafo muzika tempo” kaj “Nokia leĝera tempo”. Per tio aŭskultantoj informiĝis pri Michael Jackson, Celine Dion, Marian Carey, Enya, Yanni kaj Kenny G.

Ankaŭ sonbendoj, produktitaj de ĉinaj kaj alilandaj kompanioj, estas vojo por ĉinaj junuloj ĝui alilandan popmuzikon. Sonbendoj kaj kontraktintaj kantistoj de kompanioj, kiel EMI, Wanner, Polygram, Columbia kaj Sony, ricevis vastan subtenon

en Ĉinio. La importitaj sonbendoj kostas po 1.5 usonajn dolarojn, iom pli karaj ol la ĉinaj.

JACKSON KAJ DION

17-18-jaraj junuloj ŝatas vigan muzikon, tial la bandoj “Spicoknabinoj” kaj “Poststrataj knaboj” tre plaĉas al ili. “Michel lernas rokon” kaj 911 estas altiraj pro juneco kaj beleco. “Knaboj al viroj” per bela harmonio kaj emocia melodio gajnis ĉinajn junulojn. Aliaj kantistoj, kiel Michael Jackson, Madonna, Celine Dion kaj Marian Carey estas superaj. En Ĉinio, ne koni ilin signifas ne koni popmuzikon el Eŭropo kaj Ameriko.

Mi ne ŝatas Jackson nek Madonna. La blankigita vizaĝo de Jackson kaj liaj altigitaj nazo kaj virineca voĉo ne plaĉas al mi. Tamen liaj kelkaj kantoj certe estas belsonaj, ekz. “Resanigi la mondon”. Madonna emas fari novaĵon. Ŝia amorveka bildlibro atentigas la mondon. Ŝiaj kantoj ne estas malbelaj, tamen amorveka prezentado en MTV kaj iaj novaĵoj igas ŝiajn kantojn malpli belaj. En la malfermo de la Atlantaj Olimpiaj Ludoj, per la kanto “La forto de amo” Dion montris sian artistan talenton. La filmo “Titanic” refoje atentigis la homojn. Ŝia kanto “Mia koro daŭros” sonis tra Ĉinio. La karakterizaĵo de ŝia kanto similas al tiu de Marian Carey. Komence mi ne povis distingi ilin.

Michael Jackson



Michael Jackson

Poste mi rimarkis, ke la voĉo de Marian en la kulmino estas pli alta, en la fino ŝi ŝatas uzi *portamento*-n, kiun preferas nigrulo-kantistoj; la voĉo de Dion estas pli larĝe tirata kiel tiu de operisto.

PIANO KAJ SAKSOFONO

Ankaŭ Enya el Britio estas mia ŝatata popkantistino. Ŝiaj kantoj estas tre liberaj kaj revigas nin. Yanni, Kenny G. kaj Claydermann estas konataj pro sia muziko. Kaj mi pli ŝatas la lastajn du. "Reveni hejmen" de Kenny G. plorigis min. Lia saksofono eldiras mian penson. La piana laboraĵo de Claydermann estas bone konata de ĉinoj. Piano por ĉinoj estas importaĵo. Ĝi estas tro luksa por multaj ĉinoj. Claydermann lerte adaptis klasikan muzikaĵon al piana laboraĵo, kaj ĉinoj trovis, ke ankaŭ muziko de piano estas tiel bela, tiel eleganta. En restoracio, magazeno kaj hotelo aŭdeblas muziko de Claydermann. Liaj sonbendoj estas tre vaste venditaj en Ĉinio.

Kantoj de Carpenter estas klasikaj. Radio-stacioj ofte disaŭdigas "Hieraŭ denove", "La pinto de la mondo" kaj "Ritmo de pluvo".

Muziko ne konas limon. Tiuj transoceanaj melodioj malfermas fenestron por ĉinaj junuloj. ■

William Auld — esperantisto de la jaro 1998

La revuo "La Ondo de Esperanto", eldonata en Ruslando, iniciatis en 1998 proklamon de la esperantisto de la jaro. Estis proponitaj 17 kandidatoj. La 15-an de decembro 1998, je la Zamenhofa Tago, estis anoncita la rezulto de la voĉdono: skota poeto William Auld estas proklamita kiel la esperantisto de la jaro 1998. La proklamo rekonas la lastatempan meritojn kaj atingojn de William Auld, interalie, la vastan amaskomunikilan eĥon pro lia kandidatigo al la literatura Nobel-premio; la kompletigon de la kolosa tradukprojekto "Tolkien en Esperanto"; la prudenton kaj volfirmon en la afero pri "La Manto". Krome, la elekto estas bona komenco por la Jubilea Jaro de Auld, kiu 75-jariĝos en 1999.

Radio Aŭstria Internacia

Dimanĉe: 04h05, 15h05 UTC je frekvencoj: 6155 kHz (49m) kaj 13730 kHz (22m)
Lunde: 00h05 UTC je frekvencoj: 7325 kHz (41m); 9495 kHz kaj 9870 kHz (31m)
Jena horaro validas de la 25-a de oktobro 1998 ĝis la 28-a de marto 1999

Por Mezeŭropo aldonu 1 horon pro la vintra tempokalkulo!

La programo en Eŭropo aŭskulteblas ankaŭ pere de ASTRA DIGITAL RADIO (ADR) per satelito ASTRA 1C, ĉe transpondero 45 je frekvencoj: 11.141 MHz kaj per satelito ASTRA 1G, ĉe transpondero 117 je frekvencoj: 12.692 MHz
ambaŭ estas ĉe horizontala polarizado ĉe pozicio 19° oriento.

La programo en Nordameriko aŭskulteblas ankaŭ per satelito Galaxy Five, ĉe transpondero 6

vertikala polarizado je frekvencoj: 3.820 MHz ĉe pozicio 125° okcidento.

Aŭreolo de “herezulo”



Wang Xiaobo antaŭ la domo de William Shakespeare (en 1986)

Iu tago ĉe la fino de la venonta jarcento. Studento de literatura fako serĉos ion en la biblioteko. Antaŭ la bretoj de ĉina literaturo de la 20-a jarcento li haltos. “Mi serĉas libron, kiun verkis Wang Xiaobo,” diros la studento.

de LI LIANG

TIAN scenon fakte ni ne vidos, ĉar ĝi okazos cent jarojn poste. Tamen tiuj, kiuj deziras vidi ĝin, esperas, ke en la estonteco ne mankos io valora. Neniu antaŭvidas, kian lokon en la literatura historio de Ĉinio ricevos Wang Xiaobo. Oni nur rimarkis, ke en 1997-1998 li iĝis unu el la brilaj figuroj en la ĉina literatura rondo.

Li neniam ricevis ĉinan premion rilate literaturon,

tamen estis laŭdata de humanistoj, bandaj literaturistoj, studentoj kaj oficistoj. Tiuj laŭdoj aŭdiĝis nur post lia morto en 1997. Jen ĉina kutimo — konkludo venas post fermo de ĉerko. Tamen “lia ĉerko fermiĝis”, kaj oni ankoraŭ ne donis konkludon.

KIU LI ESTAS?

Wang Xiaobo (1952-1997) kreskis en intelektuala familio en Pekino. Pro la kampanjo “Kleraj junuloj laboru en kamparo por sin transformi”, li iris kun multaj aliaj gimnazianoj de Pekino al Yunnan en sudokcidenta Ĉinio. Familia medio donis al li eblecon legi en la knabeco multajn okcidentajn klasikaĵojn. Poste li studis pri diversaj filozofiaj skoloj. Li ne tre atentis kion oni faris, sed volis pripensi ion laŭ la agoj de la ŝtato kaj ŝtatanoj. Lia pensemo formiĝis jam dum laboro en Yunnan. Li humure taksis la aferon: “Fakte en la antaŭurbo de Pekino estas multaj kampoj, tute ne necesas labori en Yunnan je miloj da kilometroj fore.” Reveninte de Yunnan, li eniris universitaton en Pekino en 1978 por studi komercan administradon. En 1984-1988 li studis en Universitato de Pittsburgh en Usono kaj magistriĝis. Dume kun sia edzino li turisme vojaĝis tra Eŭropo kaj Ameriko por sperti la vivon. Usonaj vendistoj de malpermesitaj libroj, ventomueliloj en Nederlando, “neceseja literaturo” en Bruselo... ĉiuj tiuj poste iĝis temo de liaj eseoj. Li ligis ilin kun la nuntempa Ĉinio. En 1988 li revenis en Ĉinion kaj laboris sinsekve en du famaj universitatoj. En 1992 li fariĝis liberala verkisto.

“HEREZULO”

En la okuloj de reprezentantoj de la ĉefa kulturo kaj ortodoksa moralo, Wang Xiaobo estas “herezulo”. Ankaŭ la komentistoj renkontis malfacilaĵon: li apartenas al neniu skolo, liaj strangaj pensoj kaj akraj esprimoj estas iom netolereblaj.

Wang Xiaobo ne estis akceptita de la rondo de la ĉefa kulturo kaj havis sian lokon nur en la popolo. Lia penso tamen radias brilon de nova ideo kaj nova kulturo. “Herezulo” havas aŭreolon.

Kiel liberala verkisto, li ne tre atentis opinion de

aliaj, sed alte taksis racion. En maro de scioj kaj saĝo li serĉis plezuron de penso. Racio regis lian mallongan vivon. Liaj verkoj odoras ecojn de G. Bernard Shaw kaj Mark Twain. Dum la “kultura revolucio” de Ĉinio ĉie estis “revoluciaj” vortoj. Travivinte la tempon de blinda sekvado, li dubis pri tia kredo, ĉar li sciis, ke ĉu en Ĉinio, ĉu en la okcidentaj landoj, okazis multaj persekutoj al “herezuloj” sub la ŝildo de nobleco. Kredo estas rivero inundema, ĝi bezonas bordon de racio.

Inter la samepokaj intelektuloj Wang estis izolita, aparta kaj originala. Multaj liaj verkoj fontas el la “kultura revolucio”. Jen lia eseo “Originala Porko”: la heroo — porko, ne volas obei la homojn, dum aliaj porkoj estas enfermitaj en la stalo. Ĝi libere kuras al la urbeto por serĉi porkinon; ĝi scipovas imiti diversajn sonojn — ĝi fajfas kiel sireno, kaj aŭdinte tion, la homoj ĉesas labori je duonhoro pli frue. Kiam oni intencas puni ĝin, ĝi forkuras... Wang diris: “Mi jam estas 40-jara, tamen krom la porko mi vidis neniun alian, kiu kuraĝas ignori aranĝon de aliaj pri la vivo. Male, mi vidis multajn, kiuj ŝatas aranĝi vivon de aliaj, kaj ankaŭ multajn, kiuj blinde akceptas la aranĝon de aliaj.” Li ja profunde komprenis la vivon.

FLUGI SILENTE

La ĉefaj verkoj de Wang Xiaobo estas “Trilogio de la Tempo” kaj eseoj. La plej elstara estas “Ora Tempo”. Antaŭ la publikiĝo la tajpita manuskripto de tiu romano jam cirkulis en altlernejoj. En pionira stilo li priskribis la absurdajn agojn de la heroo Wang Er. La romano temas pri sekso kaj montras la maturan verkarton kaj altan estetikan nivelon de la aŭtoro. Per humuraj vortoj kun tristeco li analizis la “Oran Tempon”, alinome “Revolucian Epokon”, pesis ĝin per komuna kriterio de homa racio. Li malkaŝis la absurdan logikon, kiu regis tiun tempon.

Pli multaj homoj konis lin pere de liaj eseoj. En la brua tempo, per siaj personeco kaj konscienco, li en izoliteco pensis per propra cerbo kaj montris sian ideon al la socio:

“Sub la brua parolantaro ĉiam ekzistas silenta plimulto. Sinsekve eksplodas ‘spiritaj atombomboj’, kie do ni havas la rajton de parolo? Sed nun ni ekparolas. La antaŭaj paroloj havas nenian rilaton kun ni — unuvorte, ni rompis kun ili.”

En la 10-a de aprilo 1997 li sola verkis en sia loĝejo en antaŭurbo de Pekino kaj forlasis la legantojn, kiuj ŝatas lin. Lia familiano vidis, ke lia korpo estis kurba — li subite mortis antaŭ kelka tempo pro kormalsano.

Li silentis. Ne. Post lia forpaso eldoniĝis pli ol dek liaj verkoj, kaj diversaj homoj ekkonis lin. En liaj verkoj oni legis akrajn kritikojn al diversaj figuroj de la homaro. Oni vidis ankaŭ la koron favoran, entuziasman kaj saĝan. ■

Internacia Trilanda Renkontiĝo

Esperantistoj el Germanio, Nederlando kaj Belgio tradicie kunvenas ĉi-foje en Stolberg, Germanio, la 21-an de marto 1999.

Temo: La homa laboro dum pasinteco kaj nuntempo

Informoj haveblaj ĉe:

Klaus Hogen

Im Pesch 20, D-52136 Herzogenrath

Telefono: xx-49-2406-7809

Fakso: xx-49-2406-7809

Retadreso:

hogen@t-online.de

Konkurso de Monda Hortikultura Foiro '99 de Ĉina Radio Internacia

La Monda Hortikultura Foiro '99 okazos en Kunming de Yunnan-provinco, Ĉinio, de la 1-a de majo ĝis la 31-a de oktobro 1999. La ĉeftemo estas: Homo kaj naturo — marŝe al la 21-a jarcento.

Por helpi siajn aŭskultantojn bone koni la nomitan foiron, Ĉina Radio Internacia (ĈRI) aranĝas la konkurson. Se vi aŭskultas la Esperanto-programeron de ĈRI “Vojaĝo en Ĉinio” respektive je la 5-a, 12-a kaj 19-a de marto 1999, vi certe trovos respondojn al la demandoj de la konkurso kaj havos ŝancon ricevi premion. Ĉiu partoprenanto ricevos memoraĵon. Tre bonvenas ankaŭ la partopreno de legantoj de “El Popola Ĉinio”. Detalaj informoj pri la foiro kaj konkurso haveblas ĉe Esperanto-Sekcio, Ĉina Radio Internacia, Beijing 100040, Ĉinio. Retpoŝto: cri@box.cri.com.cn.

Kampara knabino

(Kore-nacia popolrakonto)

ANTAŬ tre longa tempo estis regno, kiu suferadis de politika ĥaoso pro fikorteganoj kaj kies popolo vivis tre mizere.

La reĝo ne havis taŭgan rimedon por savi la regnon. Li ne bone manĝis nek bone dormis. Iutage en lian kapon subite venis ideo: havigi al si spritan edzinon por helpi lin savi la disfalontan regnon. Li do dekretis al la tuta regno:

“Mi volas saĝan virinon kiel mian edzinon. Ne gravas ŝia familia rango, ŝiaj klereco kaj aspekto. Kiu interesiĝas, venu ekzameniĝi post tri tagoj.”

En la tago de ekzameno belulinoj venis de ĉiuj direktoj.

Ili streĉis sian cerbon por diveni demandojn de la reĝo kaj maltrankvile rigardis la reĝon, sidantan sur la trono.

Fine la reĝo demandis: “Kiom longe estas inter la lokoj de sunleviĝo kaj sunsubiro?”

Silento. Homoj loĝantaj sur la ebenaĵo opiniis, ke la distanco estas longa. Tiuj en montaro pensis, ke mallonge. Neniu metodo povas mezuri la distancon.

Tiumomente iu kampara knabino malrapide eliris el la homamaso kaj diris nek humile nek impertinente: “Estas unutaga distanco.”

Ĉiuj korteganoj miregis pri ŝia respondo. La reĝo ĝojigis: “Brave! Brave!”

Sekvis la dua demando: “Kiom longe estas inter la ĉielo kaj tero?”

Virinoj, kiuj ĵaluzis kontraŭ la

kampara knabino, respondis konkure.

“Laŭdire 45 000 kilometroj. Mi kredas tion.”

“La Tang-dinastia bonzo Xuanzang pilgrimadis 90 000 kilometrojn al la Okcidento por peti sutrojn. Mi pensas, ke la distanco inter la ĉielo kaj tero ne estas pli longa ol tio.”

... ..

Estis diversaj respondoj. Kuntirante la brovojn, la reĝo senĉese skuis la kapon.

Fine la kampara knabino diris: “La distanco estas tiom longa, kiom inter fermo kaj malfermo de la okuloj.”

La ekzamenejo ekbolis de miro.

Gaje la reĝo starigis la trian demandon: “Kiom longe estas inter la vero kaj malvero?”

Ĉiuj stuporiĝis de la demando. Ĉu estas mezurebla la distanco inter la vero kaj malvero? Momenton poste, la knabino respondis senhezite: “Mi pensas, ke la distanco estas tiom longa, kiom inter la du oreloj.”

La reĝo ne komprenis kaj tuj demandis: “Kion tio signifas?”

“Estas popoldiro: per unu orelo aŭskultas la malsaĝaj, per du la saĝaj. Ĉu bone aŭ malbone regi la regnon dependas de tio, ĉu per unu aŭ du oreloj aŭskulti la opinion. Tial mi konsideras, ke la distanco inter la vero kaj malvero estas tiom longa, kiom inter la du oreloj.”

Aŭskultinte, la reĝo ekkomprenis kaj la korteganoj aplaŭdis.

Nature, la kampara knabino fariĝis reĝa edzino.

Helpe de ŝi, la regno reprosperiĝis post mallonga tempo kaj la popolo vivis trankvile kaj laŭdis ŝian laboron.

Tamen tiuj fikorteganoj malamis la reĝan edzinon, rigardante ŝin kiel dornon en la karno, ĉar pro ŝi ili ne povis agi senbride kaj kontraŭleĝe. Ili do komplotis kaj intencis makuli la honoron de la reĝa edzino, ke ŝi ne helpu la reĝon.

Ankaŭ la reĝo malĝojis, ke la popolo amas lian edzinon pli ol lin. Li eksuspektis la edzinon pro la semado de malkonkordo far la subuloj.

Iutage la reĝo diris al sia edzino: “Vi devas forlasi la reĝan palacon. Ne ĉagreniĝu, kaj mi garantias al vi riĉecon kaj feliĉon kiel en la palaco. Vi povas forpreni ĉion, kion vi volas, escepte de la reĝaj lito kaj sigelilo.”

La edzino senhezite kapjesis.

“Kiu kuraĝus malobei vian reĝan moŝton? Mi venis de malriĉa familio. Dank’ al via favoro, mi havas ŝancon servi al vi kaj neniam forgesos tion. Nun mi devas foriri, sed mi havas unu peton. Ĉu vi lasas min diri?”

“Bonvolu.”

“Antaŭ mia foriro mi volas inviti vian reĝan moŝton kaj la korteganojn al simpla bankedo, kiun mi mem preparos.”

“Bone, bone!”

Okazis la adiaŭa bankedo kun bongustaj pladoj kaj aroma vino. La reĝo kaj korteganoj ebriiĝis. Li pli multe drinkis pro la dolora disiĝo de sia edzino kaj tuj senkonsciiĝis. Subite la reĝa edzino ordonis:

“Preparu kaleŝon! Hodiaŭ la reĝo inspektos kun mi. Ni bezonas neniun krom unu sekvanto. Ni tuj ekiros!”

Aŭskultinte la ordonon, la korteganoj duone vekigis de ebrieco. Unu el ili furiozis: “Lia reĝa moŝto ne devas tiel eliri el la palaco!”

“Aŭskultu, kiu aŭdacas malobei min, tiu ricevos mortpunon!”

La korteganoj terurigis pro ŝia kolerego.

La kaleŝo eliris el la palaco. Kiam la suno subiris, ili venis al iu vilaĝo. Sur la vojeto paŝtistoj kun bovoj kaj ŝafoj kaj kamparanoj kun ŝpato revenis hejmen. Tiam la reĝo vekigis de ebrieco kaj rigardis ĉion antaŭ siaj okuloj.

“Vi promesis, ke mi povas havi ĉion, kion mi volas, escepte de la reĝaj lito kaj sigelilo. Nek la liton nek la sigelilon mi bezonas, mi volas nur pacan vivon de nia popolo. Pro



tio mi veturigis vin ĉi tien,” diris la reĝa edzino.

La reĝo rememoris la malfacilajn jarojn de la regno, kiam dezertiĝis la kampoj kaj ĉie videblis kadavroj de malsatuloj. Li havis grandan bedaŭron kaj petis pardonon de la edzino.

“Kiel reĝo senkapabla, mi falis en la insidon de la fikorteganoj kaj hontas antaŭ vi. Mi petas vin reiri al la palaco!”

Poste la reĝo kaj lia edzino en unuanimeco reordigis la kortegon kaj pliprosporigis sian regnon. ■

Kalendaro: Unu el la plej popularaj!

La Plenan Kalendaron de Esperanto-Aranĝoj (troveblan ĉe la retpaĝo: <http://www.hungary.net/esperanto/kalendar.htm>) en 1998 rigardis 2627 vizitantoj. Per tio (apud la centra retpaĝa adreso de VEB kaj FEL) la “kalendara paĝo” iĝis unu el la plej ofte vizitataj Esperanto-paĝoj! La “Plena Kalendaro de Esperanto-Aranĝoj” momente listigas 345 Esperanto-aranĝojn, kiuj daŭras sume 1921 tagojn. La “Kalendara Paĝo” estas la plej kompleta listo pri E-aranĝoj, kaj estas daŭre (pr. monate) aktualigata!

Ret-Info

La Retpoŝta Esperanto-Novajŝervo RET-

INFO (priskribo troveblas ĉe: <http://www.hungary.net/esperanto/ret-info.htm>) en 1998 distribuis 899 mesaĝojn ligitajn al la Esperanto-movado aŭ al faka utiligo de la lingvo. Pere de ret-info distribuiĝas krom la ĉiutagaj 2-4 mesaĝoj ankaŭ la retpoŝtaj versioj de Eventoj (sendependa internacia E-gazeto), de “La Merkato” (organo de IKEF) kaj SEJM-virt-info. La ricevantoj povas iam ajn ŝanĝadi sian kategorion inter TUT — ĉiuj informoj, SEL — nur selektitaj informoj, EVE — nur la retpoŝta versio de Eventoj. En la datumbanko de E-gazetaro momente ni registras 205 ekzistantajn E-gazetojn, inter ili 120 redaktoroj havas ret-adreson.




Maljunulo Wang

Espero de maljunulo Wang

Teksto kaj fotoj de JIAO BO

Maljunulo Wang estas kamparano. Antaŭe pro malriĉeco neniu el liaj antaŭuloj vizitis lernejon. La deziro, ke la postuloj estu klerigataj, forte tiklas la pli-ol-80-jaran maljunulon.

Li donis signifoplenan nomon al sia filo, esperante, ke li diligente lernos. Kvankam li tutforte laboradis en la kampo, tamen al li ankoraŭ mankis mono por vivteni la tutan




Maljunulo Wang ankoraŭ pensas dum paŝtado de bovo.

familion, por ne paroli pri lernopago de la filo.

Nun la familianoj vivtenas sin ne nur per terkulturo, sed ankaŭ per bredado de kunikloj kaj ansoj. La familio pli kaj pli riĉiĝis. Sinjoro Wang metis la esperon sur sian nepon. La nepo estas lerne-ma. Dimanĉe, kiam la

nepo estas hejme, sinjoro Wang ofte admonas al li: "Lernu pli diligente, vi estas nia espero!"



La nepo estas espero de maljunulo Wang.

Geedzoj Wang bredantaj kuniklojn kaj anasojn



Geedzoj Wang ĝojas, ke ilia nepo baldaŭ vizitos lernejon.





Bildo pri antikva kuriero

Poŝto en la antikva Ĉinio

de SHU MEI

EN la unua dinastio de Ĉinio, t.e. Xia (komenco de la 21-a jc. a.K. — komenco de la 17-a jc. a.K.) estis oficisto “voja homo”. Marte de ĉiu jaro tiuj homoj kun bastono en la mano publikigis registaran anoncon ĉe gravaj vojoj. Tio markis la komencon de la ŝtata komunikado en la antikva Ĉinio. Koncerne la ŝtatan komunikadon en Shang, la dua dinastio (komenco de la 17-a jc. a.K. — 11-a jc. a.K.), oni jam elterigis multajn historiajn objektojn, dank’ al kiuj oni informiĝis pri detaloj. De skribaĵoj sur elterigitaj testudaj ŝeloj kaj alibestaj skapoloj oni scias, ke tiam jam estis postiljonaj stacioj destinitaj por tranoktado de specialaj leterportistoj. La postiljonaj stacioj distancis po 15-25 km inter si. Sur iu testuda ŝelo oni legis, ke iu leterportisto piediris 600 km dum 48 tagoj kaj fine atingis la cellokon. El tio oni vidas, ke en Shang-dinastio ankoraŭ ne estis sistemo de oficiala stafeta letertransportado, tamen la postiljona funkcio estis progressa siatempe.

En Zhou-dinastio (11-a jc. a.K. — 256 a.K.) aperis kompare kompleta postiljona sistemo. Oni transportis dokumentojn kaj leterojn per rapidaj ĉaroj kaj leterportistoj. Pro pliiĝo de militoj inter diversaj regnoj kaj apero de kavalerianoj aperis kurieroj kaj stafeta letertransportado. Tiam aperis ankaŭ poŝta atestilo,

per kiu la leterportistoj povis tranokti kaj manĝi en postiljona stacio ĉe la vojo kaj ĝui alian privilegion, ekz. veturi per aparta veturilo. Tiam la leteroj estis skribitaj sur bambuaj aŭ lignaj slipoj. En 1975 oni eltombigis en Hubei-provinco leterojn skribitajn antaŭ 2 200 jaroj. Ili estis skribitaj de du soldatoj de Qin-dinastio al iliaj familianoj. Ilia ĉefa enhavo estis saluti la familianojn kaj peti de ili monon kaj vestojn, kaj krome ili informis ankaŭ pri batalo. La formulo estis tute malsama ol la hodiaŭa, tamen la salutaj vortoj similaj al la nuntempaj.

En Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.) la postiljonaj aferoj fariĝis jam progressaj en nordokcidenta Ĉinio. Tiam ankaŭ Romio estis prospera imperio, kie facilis poŝtado kaj diverslandaj komercistoj kaj senditoj povis veturi de Ĉinio rekte al Romo, ĉefurbo de Romio, laŭ la poŝta vojo.

En la sekvantaj dinastioj, de 265 ĝis 589, en la ĉina poŝta historio aperis multaj novaj aferoj: En la periodo de la Tri Regnoj (220-280) aperis signalflago kun diversaj koloroj kaj bildoj, kiujn oni transdonis de stacio al stacio por publikigi registarajn anoncojn. Tiam aperis ankaŭ papero. Ĝi estis malpeza kaj malmultekosta kaj iom post iom anstataŭis la pezajn bambuajn kaj lignajn slipojn.

En la dinastioj Sui kaj Tang (581-907) plimultiĝis postiljonaj stacioj kun pli ol 20 000 laborantoj. La stacioj formis grandan reton kovrantan la

tutan landon. Tiam aperis ankaŭ poŝta tubo sur akvovojoj. Laŭdire en la jaro 615, kiam imperiestro Yang Guang veturis norden por ĉasado, li kaj liaj subuloj estis ĉirkaŭitaj de malamikoj. La imperiestro skribis edikton, metis ĝin en lignan tubon kaj flosigis ĝin sur la rivero laŭ la fluo. La helpotrupo ricevis la edikton kaj frakasis la malamikan sieĝon. En la dinastioj Sui kaj Tang estis ankaŭ aera poŝtado. Tio kompreneble ne estis per aviadilo, sed per kajto, kolombo k.a.

En Song-dinastio (960-1279) estis tri specoj de poŝtado, t.e. transdoni leterojn per piedirantoj, rajdistoj kaj kurieroj. La unua estis destinita por sendi ordinarajn dokumentojn kaj transporti pezajn objektojn de la registaro. La ĉevaloj, kiuj transportis urĝajn dokumentojn, plejparte estis maljunaj kaj malfortaj, kiuj ne taŭgas por plu servi en la milito, tial oni ne uzis ilin por sendi ekspresajn dokumentojn. La kurieroj povis iri 200 km ĉiutage, kio estis unika formo por sendi ekspresajn dokumentojn en Yuan-dinastio (1206-1368). Itala vojaĝisto Marko Polo skribis pri ĉinaj kurieroj: "La postiljonaj stacioj troviĝas en vilaĝoj, kiuj distancas po 5 km inter si. Tie estas kurieroj, ĉiu kun tintilo ĉe la talio. Pro la tintaĉo oni povas scii en malproksima loko, ke kuriero venas, kaj tiam la sekvanta kuriero devas sin prepari por daŭrigi la stafetadon. Ĉiu kuriero kuras nur 5 km. Tuj kiam la kuriero atingas la vilaĝon, la sekvanta

akceptas ties korespondataĵon kaj daŭrigas la stafetadon."

En Ming-dinastio (1368-1644) aperis popola leterporta societo. Tiam multaj komercistoj laboris en la loko tre malproksima de ilia hejmloko. Ili organizis samlokanan societon. Tiu societo kunvenis ĉiujare kaj elektis reprezentanton, ke li vojaĝu al la hejmloko. Tiam preskaŭ ĉiuj petis lin transdoni leteron. Tiaj societoj disvolviĝis poste tra la tuta lando kaj kontentigis la bezonon de la popola komunikado. Antaŭ tio nur altrangaj ŝtatoficistoj kaj riĉaj komercistoj povis vivteni aron da homoj por sendi privatajn informojn, dum la ordinaraj popolanoj povis nur peti oportunajn homojn transdoni leteron.

Historiaj libroj notis, ke en Qing-dinastio (1644-1911) komunikado atingis novan nivelon de rapideco en la ĉina historio. Antaŭe la kurieroj kuris maksimume 200-250 km en unu tagnokto, sed en Qing-dinastio per ĉevalo oni povis kuri 300-400 km en unu tagnokto. Per elita ĉevalo oni povis porti gravajn militajn informojn de la sudokcidento je pli ol 2 500 km fore al la ĉefurbo en nur 9 tagoj.

Tamen la malnovtipaj postiljonaj stacioj havis multajn mankojn, kaj nur en la fino de la 19-a jc. Oni iom post iom anstataŭis ilin per novtipaj poŝtoficjoj. Komence de la 20-a jc. malaperis ĉiuj malnovaj postiljonaj stacioj. Kaj post tio komenciĝis la nova periodo de poŝta sistemo. ■

Antikva postiljona stacio bone konservita



Koteksino — nova medikamento kontraŭ malario

de LI MIN

LA Monda San-Organizo raportis, ke malario tendencas al graviĝo en la tuta mondo. Ĉiujare 300-500 milionoj da homoj suferas de malario kaj la nombro de la mortintoj superas 3 milionojn, el kiuj la malpli-ol-5-jaraj infanoj konsistigas pli ol duonon. 90% de la malariuloj vivas en afrikaj landoj sude de Saharo. Preventi kaj kuraci mala-

Kiel bona kuracilo kontraŭ malario, ĝi estis honorita kiel unu el la dek gravaj sciencaj fruktoj en 1992 kaj unu el la dek higienaj fruktoj de post la fondiĝo de la nova Ĉinio.

Eksperimentoj pri artemiziino kaj ĝiaj derivaĵoj komenciĝis en la 60-aj jaroj. Tiam la tradiciaj kontraŭmalariaj medikamentoj kun klorokinino kiel reprezentanto kaŭzis al homoj drogorezistecon, kaj Ĉinio organizis centojn da sciencistoj kaj medicinistoj en kuna esplorado kaj en 1969 sukcese ekstraktis efikan elementon el artemizio (*Artemisia annua*). En 1972 oni determinis ĝian kemian strukturon kaj nomis ĝin artemiziino. Post tio oni kreis ĝiajn derivaĵojn: artemizia metiletero, dihidroartemiziino k.a. La esplorado montras, ke la kemia strukturo kaj kontraŭmalaria funkcio de artemiziino estas novaj.

En 1994, kiam en Kenjo okazis la unuafoja landskala disvastiĝo de malario en la 90-aj jaroj, delegito de la kompanio en Afriko faris ofertadon en multaj hospitaloj kaj apotekoj de tiu lando. Per la medikamento li senpage savis multajn homojn. Kaj plie, la kompanio invitis du fakulojn por okazigi kune kun kenjaj kolegoj simpozion pri prevento kaj kuraco de malario. Ili prelegis en

kvin urboj. Krom tio ili faris turneajn kuracadon en multaj hospitaloj. Koteksino fariĝis tre fama inter kuracistoj kaj malsanuloj. La kompanio ŝanĝis la tablojdojn en formon tre plaĉan al la tieaj loĝantoj kaj inventis urĝsavan supozitorion kaj pulvoron uzatan speciale por infanoj. Krom tio la kompanio presis prospekton en la loka lingvo. Dank' al tio ilia kuracado sin etendis rapide al aliaj landoj, kiaj Tanzanio, Ugando, Ruando kaj Kongolando. Nun la kompanio faras pli grandan penadon por sin disvolvi kaj resanigi pli da malariuloj. ■



La prezidento de Tanzanio (dekstre) intervidiĝas kun Yang Tao (meze), ĝenerala direktoro de la Pekina Novteknologia Kompanio Koteksino.

rion estas multe atentata problemo. En la lastaj jaroj koteksino, nova kontraŭmalaria medikamento, estas uzata en iuj landoj de Afriko kaj akiris kontentigan rezulton.

Koteksino estas 3a-generacia derivaĵo de artemiziino. Ĝi estis vendata jam 5 jarojn, registriĝis kaj licenciĝis jam en dekelkaj landoj. Por krei tiun medikamenton, la Pekina Novteknologia Kompanio Koteksino faris penigan laboron.

Koteksino kun malgranda toksino estas tre efika en mortigo de gametofito kaj reduktado de recidivo.

Huangshan-monto



Huangshan-monto sidas en la sudo de Anhui-provinco, Ĉinio. Nuboj, termofontoj, groteskaj pinoj kaj rokoj tie konsistigas belan pejzaĝon. La monto etendiĝas seninterrompe kaj aspektas bele kaj krute. Ĝi estas unu el la plej famaj turismaj lokoj en Ĉinio kaj allogas turistojn en- kaj eksterlandajn. La poŝtmarko-serio el ok pecoj prezentas naturajn pejzaĝojn de la monto. Ĝi estis emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en 1997.



Pagodoj en Dali de Yunnan

Foto de HUANG TAOPENG

ISSN 0032-4361



9 770032 436009



世界语《中国报道》一九九九年第三期
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2